

PROTOKOLO DE LA KONGRESAJ LABORKUNSIDOJ BEOGRADO 2006

Kongresejo : La kongreslaboroj okazis en Studenta urbo de Nova Beogrado, krom la solena malfermo, kiu okazis en la domo de Serba Fervojo. En Studenta urbo ĉiuj kongresanoj ankaŭ loĝis.

Kongresa libro : Ĉe la alveno la kongresanoj ricevis kongresmaterialon inter kiuj estis bela kongreslibreto, kun la programo kaj diversaj aliaj informoj.

Libroservo : Bedaŭrinde la Libroservo ne ekzistis.

SOLENA MALFERMO

Solena malfermo okazis dimanĉe la 20-an de aŭgusto en la Domo de la Serba Fervojo, en la centro de Beogrado, ĉar la kunorganizanto de la kongreso estis Beograda Fervojista Esperanto-Societo “Branko

Maksimoviĉ”.

Unue k-dino **Tereza Kapista** transdonas la vorton al s-ro **Milivoje Stefanoviĉ**, reprezentanto de la Fervojista Esperanto-Societo “Branko Maksimoviĉ”, kiu estas kunorganizanto de la kongreso. Li diras: *“Estimataj gekamaradoj, amikoj, karaj gastoj. Kun granda plezuro mi vin salutas nome de Fervojista Esperanto-Societo “Branko Maksimoviĉ” kiu estas loka organizanto de tiu ĉi kongreso. Finiĝis kvindek jaroj de ekzisto kaj sukcesa laboro de la Societo kaj tian jubileon estas plej bone festi dum tagoj kiam Laborista Sennacieca Asocio Tutmonda ankaŭ celebras kvindek jarojn depost la unua Kongreso de SAT sur teritorio de Serbio. Humanaj celoj de SAT, vivo en paco kaj bonstato de homoj, ĉiam estis proksimaj al Beogradaj fervojistoj. Ni ambaŭ uzas lingvon Esperanto celante faciligi komunikadon*



inter la tutmondaj laboristoj. Multaj niaj societanoj troviĝas en la rondo de SAT. SAT-membro estis ankaŭ prezidanto de la Organiza Komitato de la 29-a SAT-Kongreso en Beogrado, kamarado Branko Maksimoviĉ, kies nomon portas nia Societo ekde la jaro 1979. Mi volas danki al "Fervojoj de Serbio", kiu signife helpis organizon de la ĉijara Kongreso kaj dum multaj jaroj subtenas la laboron de nia Societo. Ankaŭ mi, kiel OKK-ano de la nuna kongreso, dankas al ĉiuj aliaj organizoj kaj unuopuloj kiuj jam helpis aŭ helpos sukcesan okazigon de nia komuna jubileo. Al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso mi deziras sukcesan laboron, sed ankaŭ plenan ĝuon dum la distraj programeroj kaj ekskursoj. La pluan gvidon de la solena malfermo prenos reprezentantoj de la Plenum-Komitato de SAT, al kiuj mi aparte dankas pro elekto de Beogrado por la ĉijara kongresurbo. Vivu kaj persiste antaŭen!"

K-do **Barkoviĉ** salutas nome de k-do **Jakvo Schram** kiu alvenos nur posttagmeze kaj kies salutteksto, sufiĉe longa, komplete aperas en la Kongresa libro.

(NDLR: Kvankam tiu parolado aperis en la kongreslibro, por tiuj kiuj ne partoprenis la kongreson, ni ĉi-poste aperigas ĝin).

RENOVIGITA SAT

Dum la SAT-Kongreso en Zagrebo mi kandidatiĝis por plenumi duan periodon de 3 jaroj kiel prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT. La anoj de la nova P.K. akceptis min same bone sciante ke ni eniris malfacilan periodon de 3 jaroj. Malfacila periodo ne pro la fakto ke SAT kaj ĝiaj ideoj estus ne plu aktualaj aŭ malnovaj, ne! La ideoj kiuj vivas en SAT restas same aktualaj kiel antaŭ 85 jaroj pasintaj, kiam Lanti kaj la k-do fondis la asocion Sennacieca Asocio Tutmonda.

La malfaciloj de SAT troviĝas en la nuna socia koncepto. Socio, kie la individuismo regas la dancon. SAT suferas mankon de membroj simple pro la fakto ke ne plu sufiĉe da homoj komprenas ke solidareco nepre necesas, ke kupolo de progresemaĵoj pli ol iam bezonatas. SAT povas, pro sia libereco rilate al iu ajn politika partio aŭ modelo, roli kiel sindikato kies plej granda celo estas krei kaj instigi mondan solidarecon inter ĉiuj homoj.

Ĉar, eble ne malgraŭ aŭ pro la agadoj de la diversaj (partipolitik-ligitaj) sindikatoj la monda solidareco apenaŭ plu ekzistas, aŭ ĉu eble, pro abundeco de informoj kiujn ni ricevas tra diversaj kanaloj, nia percepto pri tio, kio estas solidareco, eniris alian dimension?

En ĉiutaga vivo, mi laboras jam kelkajn jarojn en socio-kultura asocio. Mi interalie instruas la nederlandan al enmigrintoj, sed precipe mi mem lernas multon pri homoj el fremdaj landoj kaj kulturoj. Tiuj homoj, kun kiuj mi en la komenco apenaŭ povas paroli, nutras mian scion pri diverseco kaj solidareco. Ili instruas min ke oni ne migradas por havi etiketon esti ŝtelisto kiel ekstrem-dekstro diras pri ili, sed kun la espero havi pli bonan vivon por si mem kaj precipe por la infanoj.

La direktoro de tiu centro estas tre klera, saĝa persono, kun kiu mi ofte parolas. Nia plej ofta diskuto temas pri la malapero, iom post iom sed ĉiam pli, de la socia reto kiu ligis, dum multaj jaroj, la homojn en vilaĝoj kaj landoj. La evidenta demando estas, kial ĉi tiu sociala reto malaperas? Plej verŝajne kiam ni konas la respondon al ĉi tiu demando ni ankaŭ konas la respondon al la demando kial SAT ne estas la plej favorata kaj granda asocio kiu uzas Esperanton.

SAT estas kleriga asocio, sed ne nur kleriga. Ĝi estas ankaŭ aktiva asocio kiu kontraŭas al ĉiuj formoj de ekspluatado de homoj.

Laŭ nia statuto, SAT uzas la internacian lingvon Esperanton por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda!

Ĉi tiu frazo povas soni nun iom arkaika, ĉar estas klare ke la iamaj klasoj, pri kiuj parolis siatempe Karl Marx, ne plu ekzistas. La historio ankaŭ multe ŝanĝis la ideojn pri kiuj Marx parolis. Se ni, ene de SAT, tro rigore uzas la esprimon klasoj kaj klasbatalo, ni eliminis tro da partoprenantoj en nia agado, grandan grupon de progresemaĵoj kiuj ne pensas laŭ la ideo de klasoj, sed laŭ ideoj de homaj rajtoj kaj respekto. En la moderna vivo ni havas la subtenantojn, batalantojn de Greenpeace, de Amnestio Internacia, de verdaj partioj kaj socialdemokratoj kiuj ne pensas laŭ sistemo de klasoj sed laŭ ideoj de subpremado, homaj rajtoj, socialaj rajtoj, lingvaj rajtoj, ktp. ktp.

Asocio kiel SAT ne povas limigi sin al preskaŭ dogmaj pensoj aŭ unuendeca retoriko sed devas ankaŭ alpreni valorajn ideojn kiuj fontas el la ĵus menciitaj grupoj. SAT neniam povas esti dogma asocio kiu vivas kun siaj ideoj kaj retoriko el la 19-a kaj 20-a jarcentoj.

Evidente la nuna monda loĝantaro daŭre kaj eble pli ol iam suferas ke grandaj grupoj da homoj estas subpremataj, ekspluatataj de et-eta grupo de posedantoj, regantoj, grandaj entreprenoj ktp, ktp por kiuj gajno kaj mono pli valoras ol iu ajn homa vivo. La ideo ke ni povos kontraŭbatali tiujn grupojn per uzado de sloganoj kaj flirtigado de flagoj ne plu aktualas.

La historio ne ĉiam estis milda por la laboristoj

kiuj celis havi pli bonan kaj socialan mondon. Kelkaj politikaj demagogoj misuzis la noblajn ideojn kiuj estas la bazo de la socialisma penso kaj nutris per tio la kontraŭantaron, la grandan kapitalon, kiu per la helpo de sekularaj sacerdotoj propagandas ke socialismo mortis kaj ke kapitalismo estas la estonto por nia mondo. Al ĉiu vorto kiun ni uzas ili havas respondon kiun donas al ili aro da specialistoj pri merkato.

Evidente SAT restas la batalanto por la rajtoj de la subpremataj, de ekspluatataj. Ni ne faru la batalon per sloganoj sed pere de agadoj. SAT konsistas el individuaj membroj de diversaj politikaj skoloj kaj partioj. La granda diverseco ne ĉiam plifaciligas la dialogon inter la membroj kaj la elekto de la ĝusta vojo ne ĉiam same facile troveblas. Tamen la ideo de Lanti grupigi ĉiujn maldekstrajn progresemlulojn, restas la



plej bona projekto kiu iam ekzistis en Esperantio kaj jes, eĉ ekster la mondo de Esperanto.

SAT membro devas posedi grandan kvaliton, esti tolerema, sed samtempe havi firman opinionon.

Kiam mi rigardas la organizojn kiel Monda Socia Forumo, mi konstatas ke en ĝi aktivis oponentaro. Tial ni ĉiam, dum ĉiu Monda Socio Forumo, havas alternativajn grupojn de aktivuloj, kiuj, malpli proksime

Alia granda malamiko de la laborprenantaro estas la ekstremdekstraj grupoj kiuj, uzante lertajn frazojn, disigas homojn de aliaj homoj. Ili indikas, uzante la devenon, koloron kaj kredon de homoj, kiu bonas kaj kiu malbonas. Ili rompas ĉiun formon de solidareco inter homoj kiuj fakte devas esti ekzemplo de solidareco: la laborantaro, la salajruloj.

El ideo de klerigado, SAT havas kiel taskon instrui al homoj ke manko de monda solidareco, kateniĝado al naciismaj ideoj kaj falado en dogmajn pensojn malfortigas la progreseman penson kaj agadon.

Kiam ni legas en statuto de SAT :”per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj” ni ne simple pensu ke tiuj dogmaj pensoj indikas nepre tiujn, kiuj kredas en dio(j)n aŭ apartenas al grupo de konservativaj pensuloj, sed ankaŭ ke dogma penso povus situi sin en tro fanatikaj ligoj en rilato kun partipolitikaj doktrinoj de maldekstro.

Moderna SAT devas esti SAT al kiu neniu plu povas glui partipolitikan, sed tre klaran progreseman ideologion.

al la regantaj grupoj, volas agadi. Mi opinias ke ni, SAT-anoj, devas havi kapablon superi tiujn diversajn tendencojn kaj ke ni, kiel unuo, kapablas krei pensmanieron kiu kritikas ne por malkonstrui sed ĝuste por kunkonstrui pli ĝustan mondon de solidareco kaj respekto por humanaj valoroj.

Ni devas malaperigi el la mondo la miton ke SAT estas **nur** klasbatala asocio, sed ĉiu progresemlulo devas scii, ke SAT ankaŭ batalas por la rajtoj de ĉiuj homoj en la batalo kiun faras Amnestio Internacia, ke SAT batalas je la nivelo de naturprotektado kion montras nia multjara kunlaboro kaj subteno de Naturamikoj kaj de Greenpacee, ke SAT subtenas ĉiujn projektojn kiuj direktas nin al paco en la mondo.

Ni devas konvinki tiujn, kiuj celas havi mondan solidarecon, respekton por biodiverseco, pacon, respekton por homaj rajtoj kaj lingvaj rajtoj ke ilia loko estas en SAT.

SAT estas la loko, kie oni komparas tezojn kaj ideojn, sed ekde la fondiĝo estas tute klare ke en SAT ni ne perdu tempon por pridiskuti la ideojn kiuj disigas homojn, kiel nun estas en ekstrem-dekstraj

grupoj, politikaj partioj kaj projektoj.

SAT estas asocio de progresemluloj, de homoj kiuj havas opiniojn kaj ideojn. Tial povas okazi diskutoj en SAT. La ideo devas tamen esti, ke tiuj diskutoj konstruas kaj ne detruas kaj ke el la diskutoj venos ideoj kaj projektoj kiuj valoras.

SAT estas grava parto de la sociala reto. Por la specifaj taskoj al kiuj SAT volas doni subtenon, la tempo eble ne tiel favoras, tamen daŭre ekzistas estonto por nia asocio.

Ekstremdekstro nuntempe povas kalkuli pri multe da subteno, bedaŭrinde precipe el la grupoj kiuj devus esti solidaraj, la laboristaro. Neoliberalismo favoras en multaj landoj, la hegemonio en la politika penso de homoj kiel usona prezidanto Bush ŝajne montras la vojon al estonto, sed la modernaj filozofioj kaj pensantoj parolas ĉiam pli pri malriĉigo de kreskiĝanta grupo da homoj. Eble la mondo staras sur sojlo de nova sociala revolucio. Revolucio kiu ne donas potencon al demagogoj aŭ certe aŭ ĉu mi diru espereble ne al la proletaro, sed al la racia penso.

La tempo, en kiu plejmulto de la mondo estas ekspluatata por ke malplimulto povu vivi luksan vivon devas finiĝi. Ni agadu, por ke SAT kontribuu al ĉi tiu batalo, al ĉi tiu revolucio de la racia pensado.

SAT estu la kupolo de la sociala penso kiu direktos nin al egaleco en rajtoj kaj respekto por homoj kaj biodiverseco. SAT fosu sian sulkon, SAT helpu rekonstrui la socian reton kiu ligas la laboristaron, la salajrulojn.

Jakvo Schram
prezidanto P.K. de SAT

K-do **Barkoviĉ** memorigas, ke antaŭ 50 jaroj jam okazis en Beogrado la 29-a SAT-kongreso, sed en tiu tempo li ankoraŭ ne estis esperantisto nek SAT-ano. En la salono tamen troviĝas pluraj personoj kiuj partoprenis al la 29-a SAT-kongreso. Por kelkaj ĝi eĉ havis vivkonsekvencojn, kiel ekz. por nia kamaradino **Zorka Enizan** el Pariza regiono (kiu devis veni kaj lastmomente rezignis). Ŝi antaŭ 50 jaroj ĉi tie renkontis sian edzon kaj translokiĝis al Francio. Okaze de tiu jubileo, la Organiza Komitato de la Kongreso decidis doni al tiuj, kiuj estas esperantistoj jam de pli ol 50-jaroj, memordiplomon. Kamaradino **Tereza Kapista** nomvokas tiujn al kiuj estas atribuitaj tiuj diplomoj inter kiuj la unua estas nia landa peranto por Serbio (antaŭe por Jugoslavio), nia fidela kamarado **Ivan Moĉilnik**. Pro la fakto ke restis kelkaj pliaj diplomoj, k-dino **Kapista** invitis tiujn kiuj estas esperantistoj jam pli ol 50 jaroj. La kongresanoj aplaudas ĉiujn. K-do Moĉilnik dankas je la nomo de ĉiuj. Sekvas muzika

paŭzo dum kiu kantas kaj muzikas kvar gefratoj el familio **Majstoroviĉ-Nestoroviĉ**.

Sekvas salutoj al la kongreso. Kamarado **Barkoviĉ** legas la salutojn kiuj alvenis skribe al la OKK. Unue venis la saluto de la ĝenerala sekretario de SAT-Amikaro, k-do **Henriko Masson**, kiu bedaŭras daŭre ne povi partopreni la SAT-kongresojn. Li aludas pri la novaj komunikteknikoj al kiuj granda parto de SAT-anoj ne aliĝis, sed la junularo jes. Tiu sennacieca komunikrimedo ebligas realigi kaj transdoni la devizon de SAT: *“Alkutimiĝu al eksternacia sent’, pens’ kaj agadkapablo!”* Li aludas pri la aktualaj financaj problemoj de SAT sed kontraŭas la ideon pri vendo de SAT-sidejo, ĉar tio estus komenco de ĝia fino. Li substrekas la grandan farendan laboron de LEA-oj en informado pri SAT, sed tion devas fari ankaŭ diversaj grupoj kaj unuopaj membroj. Li gratulas al la organizantoj de la kongreso kaj deziras sukceson. Alia saluto venis de k-dino **Lilio Grandière** el pariza regiono. Ŝi bedaŭras ke pro la aĝo ŝi ne plu povas partopreni la kongresojn kaj esprimas esperon ke la kongreso trovos kiel eble plej bonan solvon por savi SAT. Fine ŝi deziras sukceson al la kongreso. Sekvas la saluto de k-do **Ivica Ŝĉepanoviĉ** el Kroatio kiu same bedaŭras ne povi partopreni kaj deziras sukceson al la kongreso. Alvenis komuna saluto el **Internacia Junulara Kongreso (IJK)** kiu okazis en Sarajevo. Ili sendis oficialan afiŝon de la kongreso kun multegaj subskriboj dorse de tiu afiŝo. Temas pri gejunuloj, kiuj aparte kongresis. Estus bone se ili venus al ni ĉar ni bezonas junulojn. Nur ili estas la estonto de E-movado kaj de SAT. Kongreso aplaŭde salutas tiun belan geston de E-junularo. K-dino **Kapista** informas ke ni ricevis ankaŭ saluton de **Nacia E-Asocio de Burundio (Afriko)**. Ilia prezidanto devis veni al la kongreso sed bedaŭrinde ne ricevis la vizon. K-do **Barkoviĉ** informas ke ankaŭ pluraj gekamaradoj el Francio ne povis alveni pro ŝanĝoj de pasportoj en Francio kiuj estas elektronikaj kaj tio postulas pli longan tempon. Do, pro lastmomenta peto de tiuj pasportoj ili ne povis esti ĝustatempe liveritaj.

Sekvas salutado de LEA-oj kaj individuoj. K-do **Dominiko Simeone** legas la saluton de la franclingvia LEA, **SAT-Amikaro** kaj ĝia komitato. Ili ankaŭ esprimas la esperon ke la kongreso trovos solvon por savi SAT kaj ĝian sidejon. Nome de **SATEH** salutas ĝia prezidanto, k-do **Pedro Hernandez** kiu diras ke fakte nia kamarado **Kani** devus saluti la kongreson, sed li subite malsaniĝis kaj restis en sia ĉambro. SATEH bone funkcias, havas multajn junajn membrojn kaj li esperas ke ĝi povos baldaŭ venigi plurajn junulojn al SAT. Por **SATEB** salutas kamarado **David Kelso** el Skotlando kaj

deziras al la kongreso grandan sukceson. Por **Itala LEA** salutas **k-do Andrea Montagner**, prezidanto de nova asocio kiu nomiĝas **ARCI ESPERANTO** kiu salutas kaj bondeziras nome de italaj SAT-anoj. Nome de **Germanlingvia LEA** salutas k-do **Gary Mickle**. Bedaŭrinde la situacio de LEA/G ne estas bona sed ĝi tamen ekzistas kaj li portas salutojn de ĝiaj membroj al la kongreso. Sekvas salutoj de SAT-Frakcioj kaj Fakoj. K-do **Simeone** salutas nome de la **Liberpensula Frakcio** kaj je la nomo de la **Komisiono Esperanto de la Nacia Federacio de la Libera Penso** en Francio. Nome de **Sennaciista Frakcio de SAT** bondeziras kaj salutas k-do **Djemil Kessous**. Nome de la **Ekologiista Frakcio** salutas k-do **Manfred Westermayer** kiu invitas ĉiujn al la frakcia kunveno hodiaŭ posttagmeze, kaj nome de la **Komunista Frakcio** salutas k-do **Dieter Rooke**. Nome de la **Poresperanta Fako** salutas k-do **Vinko Markov** kaj invitas al la kunveno de tiu ĉi nova fako (ĝi kreiĝis antaŭ du jaroj). Nome de la **Ĉielarka Frakcio** salutas k-dino **Viola Murasaki** el Japanio.

Sekvas la salutoj laŭ la landoj. Por Aŭstrio salutas k-do **Martin Stuppnig** kiu kiel ekسفervojisto sentas sin hejme en la domo de Fervojistoj. El Aŭstralio salutas k-do **Bernardo Heinze**, nia landa peranto, kiu hontas pri aŭstralia registaro kiu sklave sekvas Usonon. Ankaŭ el Aŭstralio salutas k-do **Kep Enderby** kiel eksprezidanto de UEA, kiel eksprezidanto de Aŭstralia E-Asocio, kaj same salutas nome de Esperanto Civito. Li opinias ke la nuna krizo de SAT estas komprenata de la tuta E-Movado kaj ke dum la semajno eble oni povos trovi solvon de tiu ĉi krizo. El Bulgario salutas **Zlatka Stoilova** kaj deziras sukceson al la kongreso. El Bosnio kaj Hercegovino kaj nome de E-Societo “La Mondo” el Banja Luka salutas k-dino **Mira Makiviĉ**. El Britio salutas nia landa peranto, k-do **Arturo Prent**. El Germanio salutas nome de germanaj SAT-anoj k-do **Jankowski** kaj krome li salutas nome de k-dino **Irena Butnorieni** el Litovio. S-ino **Ursula Niesert** el Germanio salutas kiel gasto kiu faris tiun vojaĝon nostalgie pri eksa-Jugoslavio, kiun ŝi konsideris modela, kaj kio montriĝis malvera. Al Jugoslavio mankis komuna identigilo kaj tiun vojon iras ankaŭ la aktuala Eŭropa Unuiĝo. Eble SAT havus ion por fari en tio, kaj tio povus venigi sufiĉe da novaj membroj. Ĉar k-do **Pedro Hernandez** jam salutis nome de SATEH li nun volas diri kelkaj vortojn pri la estonteco de SAT. Estonteco de SAT estas junularo kiu mankas en SAT. Laŭ li, SAT devas klopodi krei LEA-ojn tie kie ili ne estas. LEA-o povas tiam pli facile allogi la junulojn per loka agado. En neŭtrala movado nun estas multaj junuloj kiuj komencas lerni Esperanton pere de la reto

kaj skajpo (skype). SAT do devas subteni la uzon de tiuj modernaj rimedoj kaj uzi por varbi la junulojn. Lastatempe la SAT-diskutejo en la reto estas sufiĉe interesa. Oni multe diskutis kaj diskutas pri la aktuala politiko, kio estas interesa por la junuloj. La propono estas ke oni ebligu al junaj ne-SAT-anoj partopreni en tiuj diskutoj, precipe kiam ili estas invititaj de membroj de SAT. Ĝi ne restu rezervita nur por la membroj. El Italio, k-do **Andrea Montagner**, kiu jam salutis, nun deziras aldoni kelkajn informojn pri tiu nova asocio **ARCI ESPERANTO** (Arĉi Esperanto). ARCI en Italio estas neesperanta itala maldekstra asocio kiu akceptas havi Esperantan parton. La tasko de tiu Esperanta parto estas partopreni en diversaj festoj de maldekstruloj por montri ke inter esperantistoj estas ankaŭ maldekstruloj kaj ne nur neŭtraluloj. Post la reveno el la kongreso ni organizos budon dum la maldekstrula festo en Milano. Tiel ni povas varbi novajn esperantistojn kaj novajn membrojn al SAT. El Israelio salutas kaj bondeziras k-do **Kupperman**. El Japanio, k-dino **Viola Murasaki** salutas nome de japanaj kaj koreiaj gekamaradoj. Por Kroatio salutas k-do **Morankiĉ**. K-dino **Gražina Opulskiene** salutas la kongreson nome de Litova Esperanto-Asocio kaj kiel landa perantino nome de litovaj SAT-anoj. Landa perantino por Nederlando, k-dino **Corrie Kwantes-Kooy**, salutas nome de nederlandaj SAT-anoj. Por Pollando salutas k-dino **Zofia Banet-Fornalowa** kiu plendas pri la malfacila transiro de eksaj socialistaj landoj al kapitalismo. Sed ŝi tamen esperas ke tio ŝanĝiĝos. Do ŝi salutas la kongreson kaj dankas al la serbaj gekamaradoj pro la organizo de la kongreso en malfacilaj kondiĉoj. El Portugalio salutas kaj bondeziras k-do **Alves Alcino Ramos**. Pro la pli frua forgeso nun salutas el Brazilo s-ino **Aparecida De Souza Araujo**. K-dino **Tamara Kostjuk** samtempe salutas por tri landoj: Ukrainio, Rusio kaj Belarus. Ŝi kelkfoje prezentas la movadon de Feliĉuloj. Ŝi anoncas ke ilia prezidanto estas liberigita kaj nun ili povas libere funkcii kaj ekzisti en Rusio. Nome de la gastolando Serbio salutas k-do **Adem Jakupoviĉ**, sekretario de SEL per bonvenigaj vortoj kaj deziro pri la sukceso. S-ino **Feifiĉova Magdalena** el Slovakio transdonas personajn salutojn de k-do **Vaclav Stiburek**, SAT-peranto por Ĉeĥio kaj k-do **Miro Zavodsky**, SAT-peranto por Slovakio. Malgraŭ la gravaj konsekvencoj de aŭtoakcidento, kamarado Miro daŭre partoprenas al la kunvenoj de E-grupo el Žilina ĉar la prezidanto de la grupo veturigas lin al diversaj kunvenoj kaj aranĝoj. Fine de la laŭlandaj salutoj, k-dino **Viola Murasaki** ankoraŭ salutas nome de la **Liberecana Frakcio de SAT**, kiu momente ne tre vigle funkcias sed tamen ekzistas. K-dino **Franciska Toubale** salutas

nome de la **Esperanto-radio** en Aŭstralio, kiun nun ĉiuj povas aŭdi pere de la reto. Tiu radio nomiĝas **3ZZZ**. Ŝi krome aldonas ke ŝi vizitis Koreion kie ŝi renkontis tieajn SAT-anojn. Ili ĉiuj estas junaj kaj tio povas doni al ni ĉiuj esperon. Per tio finiĝis la salutoj. La vorton transprenas k-dino **Kapista** kiu salutas la ĉeestantajn aktorojn, kiuj akceptis senpage prezenti bonan programon kaj ŝi tion anticipas dankas. Ŝi nomas ilin: temas pri **Vida Jerman** el Kroatio, **Jerzy Fornal**

en la nuna mondo de kapitalismo kaj grandentreprenoj. Antaŭ la komenco li salutas la kongreson nome de belgaj SAT-anoj kaj precipe de nia k-dino **Stella De Weerd** kiu por la unua fojo post dekoj da jaroj ne povas partopreni nian kongreson. Ŝi ege suferas pro tio.

K-do **Barkoviĉ** unue legas kelkajn salutojn kiuj alvenis al la SAT-oficejo en skriba formo. Unue li legas saluton de k-do **René Ballaguy** el pariza

regiono, kiu salutas la kongreson nome de la **SAT-Frakcio por la distribua ekonomio** kaj memorigas al ĉiuj ke la distribua ekonomio daŭre valoras por kontraŭbatali la aktualan liberalismon. La dua estas saluto de k-dino **Elzbieta Janusz**, pola perantino de SAT, kiu transdonas salutojn de la polaj SAT-anoj. K-do **Michael Scherm**, kiu bedaŭras ne povi partopreni la kongreson, salutas



el Pollando kaj **Saša Pilipoviĉ** el Serbio. Sekvas prezento de la eldonita poemkolekto de la E-poetino **Greta Stoll**, kiun ĉiu kongresano ricevis senpage kun sia kongresmaterialo. Juna **Marija Kiš** recitas unu poemon el la poemkolekto.

Per tio finiĝis solena malfermo. Sekvis komuna fotado kaj komuna tagmanĝo en la Fervojistia restoracio.

UNUA LABORKUNSIDO

K-do **Jakvo Schram** malfermas la Unuan laborkunsidon kaj petas pardonon pro la neĉeesto dum la solena malfermo de la kongreso. Temas pri problemoj inter lia feriloko kaj la aviadilo. Tio malhelpis ke li alvenu ĝustatempe por la solenaĵo. Tiu ĉi kongreso estas tre grava por SAT. Li esperas ke la tuta kongresanaro pensos kune, ke ni estos unuecaj, ke ni montros ke ni SAT-anoj volas havi progreseman asocion, ke ni estas progresemaĵoj kiuj volas ŝanĝojn

nome de la **Germana Internacia Societo Neu-Ulm**. Ankaŭ alvenis la saluto de k-do **Richard Schneller** kiu same bedaŭras ne povi partopreni pro profesiaj kialoj. K-do **Vincent Charlot** kiu devis partopreni la kongreson kaj pro ne ĝustatempe ricevo de la pasporto, ne povis veni. Li salutas propranome kaj nome de la **Ĝenerala Konsilantaro de SAT**. Ankaŭ alvenis persona saluto de nia juna koreia kamarado **Paz**.

K-do **Barkoviĉ** legas la nomojn de forpasintaj gekamaradoj kiujn oni memorigas per unuminuta silento.

Elekto de prezidantaro: K-dino **Renata Chassard**, k-do **Andrea Montagner**, k-do **Dominiko Simeone** kaj k-dino **Franciska Toubale**.

Proponkomisiono: k-do **Vinko Markov**, **Gary Mickle**, **Andrea Montagner**, **Pedro Hernandez** kaj k-dino **Colette Weiss**.

La unua prezidanto estas k-do **Dominiko Simeone**. Oni komencas trakti la Raporton de la Plenum-Komitato.

Plenum-Komitato:

Nenia interveno. Same ne pri Ekspozicio pri Hiroŝimo kaj Nagasaki.

Libro pri Koreiaj koncentrejoj: K-dino **Franciska Toubale**, kiu esperantigis tiun libron el la angla, konstatas ke fakte la ĉefa problemo pri tiu libro ne estas financa. Estas alia problemo. Do, antaŭ ol trakti la financon flankon, ŝi prezentos alian problemon kaj ŝi deziras ke oni voĉdonu pri tio, ĉu oni eldonu la libron aŭ ne. La temo de la libro estas pri la homoj kiuj troviĝas en t.n. retenejoj en Norda Koreio kaj kiel ili estas traktataj. Oni ne povas paroli pri koncentrejoj ĉar temas pri lokoj kiuj troviĝas sur tre grandaj spacoj. Oni parolas pri kruelaĵoj pri kiuj tiuj homoj suferas kaj kiel facile ili mortas. Por la gardistoj, la uloj en retenejoj ne plu estas konsiderataj kiel homoj. Antaŭ ol veni al Beogrado, ŝi estis en Suda Koreio kaj renkontis membrojn de Solidareca Paca Movado inter kiuj estas kelkaj SAT-anoj. Unu el ili reviziis la tradukaĵon. Ili kontraŭstaras la aperigon de tiu ĉi libro konsiderante ke tio estas helpo al Usono. Ja, oni scias ke Norda Koreio estas konsiderata de Usono kiel diabla lando. En la libro estas atestoj de rifuĝintoj kiuj sukcesis tra Ĉinio eskapi el Norda Koreio kaj nun estas en Suda Koreio. Al ili helpas organizoj kiuj rilatas al Unuiĝintaj Nacioj sed tamen estas internaciaj organizoj kiuj ankaŭ rilatas al Usono. Do, laŭ la sudkoreiaj gekamaradoj, montrante tiun situacion en Norda Koreio oni helpas al Usono ankoraŭ pli diablige tiun landon. La demando nun estas ĉu SAT kiel maldekstra Asocio devas montri tion ie ajn, kie oni ne respektas la homajn rajtojn aŭ oni devas sekvi la pensmanieron de k-do en Koreio.

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke tiu ĉi libro aperis jam en la angla lingvo en Japanio. Japana kamaradino petis al SAT traduki ĝin esperanten kaj eldoni ĝin, ĉar ŝi estas ŝokita kaj kortuŝita pro tiuj informoj. Ŝi opinias ke necesus tion traduki kaj aperigi por ke la mondo sciu pri tio. Ni petis al **Franciska** ke ŝi traduku. Ŝi tion faris. Japana kamarado pretas ĝin presi kaj ni jam pere de Sennaciulo invitis vin al antaŭmendo de tiu eldonaĵo. Ja, pro la fakto ke SAT havas financajn problemojn ni volis vidi kiom da personoj pretus aĉeti tiun libron. Ni ricevis ĉirkaŭ trideko da antaŭmendoj kaj japana kamarado pretas produkti tiom da libroj kiom necesas. Nun aperas tiu problemo kiun Franciska prezentis kaj ni devas decidi ĉu tiu libro aperu sub la nomo de SAT aŭ ne.

K-do **Manfred Westermayer** pretas aĉeti du ekzemplerojn. Norda Koreio havas retpaĝon eĉ en Esperanto. Temas pri amikeca reto de amikoj de Norda

Koreio. Li aliĝis al ĝi. Ni kiel esperantistoj povas uzi tiun reton kaj sendi al ili kion ni scias pri tiuj aĉaj retenejoj. Li esperas ke la libro prezentas la veron kaj ke ne estas troigo. Li ankaŭ havas kontaktojn kun la Ambassadejo de Norda Koreio en Berlino. Ili ricevis inviton partopreni Esperantistan aranĝon en Seŭlo, kaj la respondo estis, ke se ekzistas esperantistoj en Norda Koreio, ili tion scias kaj iros tien. Se la libro estas bona libro kaj diras la veron, li opinias ke oni devas eldoni ĝin. Li ne komprenas la reagon de sudkoreiaj esperantistoj, ĉar se la libro ekzistas jam en la angla, Usono tion scias.

K-do **Pedro Hernandez** opinias ke oni ne rapidu eldoni ĝin en Esperanto simple ĉar kiam estis antaŭe socialistaj landoj, kaj eĉ nun pri Irako, aperis informoj pri teruraĵoj en Irako, kiuj ne estas veraj, sed estas uzataj por pravigi agadon de Usono. Sufiĉe ofte tiaj informoj estas troigoj pro politikaj kialoj. Eĉ en la nuna konflikto inter Israelio kaj Hesbolahoj en suda Libano estas prezentata per speciala lingvaĵo de gravaj komunikiloj dum en la reto oni trovas informojn tute kontraŭajn. Laŭ la enhavo de la libro ni havas informojn (vidpunktojn) nur de tiuj kiuj fuĝis el Norda Koreio, kaj ili estas interesitaj por trovi azilon en Suda Koreio, krome tiuj kiuj finansas la eldonon de tiu libro en la angla havas intereson malfamigi Nordan Koreion. Ne pro tio ke li neas la verecon de la enhavo, sed ĉar li ne scias ĉu tio estas vera aŭ nura propagando, li preferus ne eldoni la libron.

K-dino **Zofia Banet-Fornalowa** kiel historiistino opinias ke ofte tiuj, kiuj heroldas homajn rajtojn, respekton, volas uzi tion kiel instrumenton. Ni estu tre prudentaj.

K-do **Roberto Pontnau** legis multajn similajn librojn en la franca kaj en la angla, kaj kelkaj estas dubindaj. Do tiu libro ne estas vera novaĵo. Aliflanke la rolo de SAT estas kompreneble informi pri tiaj kruelaĵoj. Sed, ni havas malgrandan pezon kompare kun la angla lingvo. Do, se libro ne provokos financajn malfacilaĵojn estus eble bone eldoni ĝin de SAT. Sed oni devas vidi ĉu ni povos vendi ĝin ankaŭ al neŭtraluloj.

K-do **Kupperman** estas por la disvastigo de tiu libro. Li opinias ke k-do Hernandez kontraŭas ĉar li estas fanatika komunisto kaj ŝatas Nordan Koreion. Li opinias ke Israelio pravis en sia milito kontraŭ teroristoj.

K-do **Dieter Rooke** diras ke en Svislando oni elsendas raportojn pri Norda Koreio, ke tio jam estas konata kaj ne valoras eldoni tiun libron. Fakte temas pri propagando. Estas multaj koncentrejoj en la mondo kaj valorus eldoni aliajn librojn pri la aliaj koncentrejoj.

K-do **Pedro Hernandez** konfirmas ke li estas komunisto kaj tion ĉiuj scias kaj laŭ lia scio estas nenia problemo esti komunisto en SAT. Do, li substrekas ke pro la fakto ke ni ne havas manieron esti certaj ĉu la libro diras la veron aŭ estas propagando, oni ne urĝu eldoni ĝin.

Fine oni voĉdonas. La rezulto: JES (por la eldono) 16, NE 11, SINDETENO 15.

Decidite serioze rekonsideri la problemon.

K-do **Djemil Kessous** proponas ke se oni eldonas la libron oni faru antaŭparolon en kiu oni indikas la aliajn aĉaĵojn en la mondo. Li akceptas proponi tekston por tiu antaŭparolo kune kun k-dino **Toubale**.

K-do **Barkoviĉ** atentigas ke oni devas trovi financajnrimedojn. La libro kostus 7€-produktokosto. Ni verŝajne eldonos ĝin en tre malgranda kvanto laŭ antaŭmendoj kaj eĉ se ni eldonos en 50 ekzempleroj, tio tute ne influos la mondon nek helpos Usonon. Evidente tio finance ne helpos al SAT sed estos unu plia eldonaĵo de SAT. Ja ni estas por homaj rajtoj kaj kontraŭ iuj ajn koncentrejoj ie ajn en la mondo.

K-do **Schram** substrekas ke la eldono de la libro ne estas kritiko de tiu situacio fare de SAT kaj de ĉiuj SAT-anoj sed simple plia informo kiu denuncas la agojn kontraŭ homaj rajtoj. El tiaj libroj oni povas multon lerni.

K-do **Pedro Hernandez** proponas ke oni imagu la situacion ke antaŭ dek jaroj SAT eldonis libron pri Sadam Hussein kaj amasdetruaj armiloj kaj poste tio montriĝis malvero. Imagu en kia situacio troviĝus SAT. Li ne scias kigrade tio estas vero aŭ propagando. Li opinias ke ni devas esti tre singardaj pri tiu libro kaj la libroj pri kies enhavo ni ne estas certaj.

K-dino **Kostjuk** opinias ke SAT estas kapabla analizi la aferon kaj tamen nepre defendi homajn rajtojn. Ŝi dankas pro la helpo kiun SAT faris kiam la membroj de PORTOS estis en malliberejo.

K-do **Barkoviĉ** substrekas ke la titolo de la libro estas “Ĉu ili diras al ni la veron?” kio signifas ke ni demandas nin pri la vereco, sed tamen temas pri rakontoj de tiuj kiuj sukcesis fuĝi el tiu infero.

K-do **Westermayer** diras ke jam antaŭe la komunistoj fermis la okulojn antaŭ la fakto pri la gulagoj Siberio. Certe ni ne helpos Usonon. Usono certe ne diros ke eĉ esperantistoj volas militon kontraŭ la Norda Koreio. Do, se ni havos monon estus bone eldoni ĝin kun antaŭparolo kiu parolas ankaŭ pri aliaj fiaĵoj kiuj okazas en aliaj partoj de la mondo.

K-do **Barkoviĉ** demandas al la ĉeestantoj, kion ili opinias pri la propono de japana kamaradino ke pro la manko de mono ni aperigu en ĉiu numero de Sennaciulo unu ĉapitron. Tio signifas ke tio daŭrus

dum pluraj jaroj.

La respondo estas negativa.

Sekva punkto estas **Manifesto en Parizo pri laikeco**. K-do **Rooke** demandas ĉu tiu problemo estas nur en Francio kaj kial nur en Parizo? K-do **Barkoviĉ** respondas ke ĉi tie estas informo pri la aktiveco de la **Liberpensula Frakcio de SAT** en Parizo. La aliaj povus fari la samon en aliaj landoj aŭ urboj. K-do **Hernandez** aldonas ke al tiu manifestacio partoprenis ankaŭ multaj hispanoj kaj eŭropanoj.

Ĝenerala Konsilantaro

Nenia komento.

Elekto de la Konflikto-Komisiono

K-do Barkoviĉ : Ĝis nun la membroj estis k-do V. Charlot, P. Levi kaj Ĝ. Kessous. Ĝemil estas ĉi tie kaj du aliaj k-do ne povas ĉeesti. Tamen ili rekandidatas. Ŝajnas ke Ĝemil hezitis kaj eble atendis la kongreson por diri pri sia decido.

K-do **Kessous**: Ni havis diskuton inter la membroj de la Konflikto-Komisiono kaj mi trovis ke por Internacia asocio ne estas taŭge ke ĉiuj membroj estas el la sama urbo aŭ regiono. K-do **Charlot** ne same opinias sed mi restas ĉe sama opinio kaj pensas ke inter ni devus esti iu nefranco aŭ eĉ neeŭropano. K-do **Schram** respondas ke tion postulas la Statuto de SAT. Do se oni volas tion ŝanĝi oni devas ŝanĝi la Statuton. K-do **Barkoviĉ** atentigas ke por tiu ĉi kongreso oni ne povas ŝanĝi la Statuton sed nur por la venonta, laŭ difinita procedo. K-dino **Toubale** memorigas ke la antaŭa KK estis kontraŭstatute internacia sed ĝi ne bone funkciis. Ĝi pli facile funkcias kiam ĝi estas loka. K-do **Barkoviĉ** demandas ĉu k-do Kessous rekandidatas aŭ ne. Li respondas ke se ne estas alia kandidato, li restos sed se estas alia, li ne plu volas daŭrigi. Do, ĉar k-do **Simeone** kandidatas, k-do Kessous retiriĝas. Oni voĉdonas pri tri kandidatoj: **Charlot, Levi, Simeone** kiuj estas unuanime elektitaj.

Membraro

K-do **Westermayer** protestas ke en la raporto oni diras ke la novaj membroj ne alvenas, kaj tio ne estas vera. Novaj alvenas sed ne sufiĉe.

K-do **Rooke** opinias ke oni devas mencii en la raporto tiujn kiuj forlasis la asocion. Li bedaŭras ke kelkaj kamaradoj el Komunista Frakcio forlasis la asocion, ĉar li mem aliĝis al SAT pro tiu frakcio. K-do **Schram** diras ke SAT nenion faris por ke ili forlasu la asocion. Do estas iu problemo en la Frakcio mem. K-do **Rooke** diras: Ankaŭ aliaj tre gravaj membroj forlasis la asocion kiel ekz. prof. Duc Goninaz, kio estas granda perdo por la asocio. Tio estas signo de regreso. Tio devus aperi en raporto, aŭ ĉu ni

silentos?

K-do **Barkoviĉ** atentigas ke en SAT ne ekzistas gravaj kaj malgravaj membroj. Ĉiuj membroj estas same gravaj. K-do **Duc Goninaz** neniam deklaris sian ekziĝon. Li ne pagis ĝis nun sian kotizon por tiu ĉi jaro. Li restas ankoraŭ en la listo de membroj kaj se li ne pagos ĝis la fino de la jaro ni estos devigataj viŝi lin el la membraro. Neniam SAT-sidejo ricevis lian ekziĝdeklaron, sed ĉiu rajtas libere aliĝi al SAT kaj eliri el SAT. Tio estas malĝojiga afero por SAT kaj ni estas malĝojaj pri ĉiu membro kiu forlasas nian asocion. Ni deziras koni la kialon, sed la persono diras tion se ĝi volas aŭ ne diras. K-do **Rooke** diras ke li mem legis la demisian leteron de k-do **Duc Goninaz** en la reto. Tiu letero ne estis sendita al la SAT-sidejo. K-do **Rooke** promesis sendi ĝin al la SAT-sidejo. K-do **Schram** substrekas ke por SAT perdo de ĉiu membro estas same grava ĉar SAT bezonas membrojn. K-dino **Viola** opinias ke estus ankoraŭ pli grave scii kial iu persono aliĝas al SAT kaj eble estus bone fari enketon pri tio. K-dino **Pinet** konstatas ke ofte la homoj ne repagas kotizon ĉar iu afero ne plaĉis al ili sed poste tamen revenas. Eble estus same por k-do Duc Goninaz.

Administrado

K-dino **Toubale** demandas ĉu jam oni trovis solvon pri la daŭrigo de administrado post 2009 - aŭ tiam estos punkto-fino? K-do **Schram** diras ke la estonton de SAT oni ne povas antaŭvidi, sed li esperas ke ĝi daŭre ekzistos kaj prosperos. Por la administrado ni devas serĉi solvon. Dum la kongreso oni parolos pri tio. Post tri jaroj ni devos daŭrigi sen tiu ĉi nuna skipo aŭ en la formo de volontula skipo. Espereble fine de la kongreso ni havos plurajn ideojn kaj solvojn.

Kasa Raporto

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke la kasraporto montras la gravan finanĉan krizon de SAT, pro manko de membroj, nesufiĉa kvanto da kotizoj (jam de 15 jaroj) kaj nun finfine mankas mono por normale funkcii. Li legas la mesaĝon de k-dino **Tereza Sabatier** kiu estas aldono al la kasraporto. Li legas ĝin:

Karaj gekamaradoj,

Mi bedaŭras ne partopreni la kongreson. Mi esperas ĝian sukceson.

Jam delonge la finanĉa situacio de SAT estas malbona. Tion pruvas la finanĉaj raportoj jam de 1991 kaj ĝis nun, en kiuj regule estas denunciataj la manko de kotizoj kaj ne sufiĉa vendo de libroj.

Feliĉe la valoro de la sidejo estas alta, sed pro historia situacio kiu faris ke SAT estis tiam fremda asocio kiu ne povis posedi bienon en Francio, la duono pagita de SAT, oficiale apartenas al SAT-Amikaro.

(K-do Barkoviĉ klarigas ke dum jardekoj SAT kaj SAT-Amikaro havis la saman sidejon en 67 av. Gambetta. Tiam, kiam SAT aĉetis sian ejon kiel fremda asocio, ĝi ne rajtis laŭleĝe aĉeti. Tiam SAT-Amikaro pruntis sian nomon kaj oficiale aĉetis la ejon sed estis SAT kiu pagis. Do efektive reale la posedanto estas SAT sed surpapere posedanto estas SAT-Amikaro. Kompreneble, ni gekamaradoj, aranĝis la aferon inter ni tiel, ke ĉiufoje la novaj membroj de Komitato de SAT-Amikaro subskribis la deklaron ke ili konscias ke tiu sidejo ne apartenas al SAT-Amikaro sed al SAT. Tio estas klarigo por ke vi pli bone komprenu pri kio temas).

La LEAoj ne estas sufiĉe fortaj por alporti novajn membrojn al SAT. Eĉ la plej forta SAT-Amikaro en Franclingvaj landoj havas multe da propraj membroj kiuj ne sentas la neceson aliĝi al SAT ; ili nur interesiĝas pri Esperanto kaj ne pri la ebleco havi kontaktojn, agadi kun fremdaj kamaradoj per Esperanto.

Krom PIV, kies nova eldono rapide vendiĝis, (kompreneble la lasta ne tiel rapide), la libroj de SAT ne multe vendiĝas ; estas morta kapitalo kiu plie uzas spacon en la sidejo. Ankaŭ arkivoj estas nombraj.

Krom la profito pro PIV, SAT eltenis dank'al postmorta donacego de SAT-anino kaj kelkaj aliaj malavaraj SAT-anoj. Sed tio iom post iom elĉerpiĝis sen povi atingi la daton de ebla emeritiĝo de nia sekretario Kreŝo en februaro 2009.

De ĉiam nia zorgo estis konservi tiun postenon, ĉar SAT ne povas sin kondukti kiel kapitalistoj kiuj forĵetas siajn laboristojn sen konsidero. Ni vere estas tre ĉagrenitaj vidi, ke certaj kamaradoj riproĉas nun nian sintenon ; ŝajnas ankaŭ, ke tro multaj ne atentis niajn ĉiujarajn bilancajn alvokojn kaj surpriziĝas pro la nuna situacio. Feliĉe tamen, ni ricevas pozitivajn reagojn de aliaj komprenemaj kaj helpemaj SAT-anoj.

Ni scias ke poste la jaro 2009, ne plu eblos al SAT havi pagitan laboriston. Jam kamaradoj proponas ke estu starigita aparta kooperativo por zorgi pri la elekto de libroj eldonotaj. (Pri tio ni parolos dum venontaj tagoj - rim. de Kreŝo). Tiam SAT ne plu havos salajron por pagi, tamen la kotizoj devos esti sufiĉaj por kovri la normalajn elspezojn: domŝarĝojn, telekomunikaĵojn, eldonon kaj sendon de gazetoj... Oni scias ke pro la malaltaj eblecoj de nepagipovaj landanoj, la eblaj kotizoj ne atingas la koston.

Tiam necesos impona skipo de SAT-anoj por zorgi pri ĉio: verko de la gazetoj, enskribo de la kotizoj en rilato kun la perantoj, kontoj, organizo de la retaĵoj... Mi bonvolas daŭre zorgi pri la kontoj kiel mi faras de pli ol dek jaroj, kiel Kreŝo mem proponis

por si mem, sed mi ŝatus havi la eblecon instrui la komputoran kontadon al kelkaj por anstataŭi min kiam necesos (malsano, aĝo...).

Tiu kongreso estas grava, en la nuna situacio. Restas ĉirkaŭ 30 monatoj ĝis la emeritiĝo de nia sekretario. Ĉu ni havos sufiĉe da financaj helpoj por helpi nin dum tiu periodo konservi nian laboriston? Ĉu por tion fari ni devos vendi la sidejon? Almenaŭ parte (tiam ĉu SAT-Amikaro ne baros al ni la vojon?). Ĉu ni estos devigataj maldungi nian laboriston kun konsekvenco: malaltigo de liaj enspezoj dum la 30 venontaj monatoj; tio kio havos konsekvencon al lia pensio dum la resto de lia vivo. Tiam, kiel decas, ĉu eblus kompensi la perdon ?

Aliel, necesas ankaŭ ke la kongresanoj pripensu la estontecon por ke SAT-anaro estu sufiĉe alloga, por ke multaj al SAT aliĝu.

Havu agrablajn laborkunvenojn,

Tereza

K-dino **Fornal** proponas ke oni kreu apartan fonduson por ebligi al sekretario atingi normale sian pension, des pli ke li promesas daŭre volontule labori poste.

La kasraporto estas aprobata.

Rilatoj kun LEA-oj

K-do **Lynn** diras ke hieraŭ okazis kunveno de LEA-Komitato kaj kelkaj LEA-oj ne estis reprezentitaj. Svedlingva, germanlingva kaj ruslingva ne estis reprezentitaj. Li ĝojas ke k-dino **Viola** ĉeestis kaj parolis pri situacio en Japanio kie ni verŝajne baldaŭ havos novan LEA-on. Li estas vere ĉagrenita ke LEAoj ne sendas siajn reprezentantojn kaj neglektas la LEA-komitaton.

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke LEA-komitato unuigas ĉiujn LEA-ojn kaj ke LEA-oj devus regule sendi siajn reprezentantojn por ĉeesti la kunvenon de LEA-Komitato. Se ili tion ne faras, tio signifas ke ili malbone funkcias. Ilia rolo estas krei esperantistojn el maldekstraj medioj kaj sendi ilin al SAT. Ne devus okazi, ke pli ol duono de iliaj membroj ne aliĝas al SAT aŭ ne volas aliĝi al SAT. Tio signifas ke ili malbone laboras kaj ne plenumas sian funkcion. Oni devas ankaŭ klarigi al ili ke se SAT malaperas ankaŭ ili malaperas. Ili ne plu havos sian ekzistokialon. Iu kiu nomiĝas SAT-Amikaro, se ne plu estas SAT ne plu povas ekzisti SAT-Amikaro. Same SAT en Britio, SAT en Hispanio ktp. Ili devas konscii pri tio kio estas ilia rolo kaj kion ili devas fari.

K-do **Pontnau** diras ke ni havas tre fortan LEA-on en Francio, SAT-Amikaro, kiu havas multajn anojn sed malmultaj el ili venas al SAT. Multaj esperantistoj

en nia klubo miksas SAT kaj SAT-Amikaron. Ni eble sendu al SAT-Amikaro malfermitan leteron por memori al ili kia estas ilia rolo.

K-do **Mickle** ne povis ĉeesti LEA-komitaton ĉar li estis en la kunveno de Sennaciista Frakcio, sed LEA/G estas preskaŭ malaperinta kaj tio estas problemo kiu koncernas plurajn aliajn LEA-ojn. Li proponas ke de nun oni kreu neformalan kunvenon kaj ke ĉiuj kiuj partoprenis en regiona aŭ loka agado povu partopreni kaj alporti siajn ideojn. Oni devus kunordigi la agadojn de la LEA-Komitato kaj Poresperanta fako. Eble tia kombinita laborgrupo estus pli efika kaj estus pli da partoprenantoj.

K-dino **Pinet**: kiel membro de SAT-Amikara Komitato mi devas tamen aserti ke la bonfarto de SAT estas nia konstanta preokupo. Ekzemple, kiam homoj venas al nia nova sidejo kaj al partoprenantoj en la kurso, ni ĉiam rakontas pri SAT kaj pri SAT-Amikaro. Kompreneble ĉiuj membroj de la Komitato de SAT-Amikaro estas delonge SAT-anoj kaj ankaŭ multaj SAT-amikaranoj estas membroj de SAT. Ĝi estas LEA kiu donas plej multe da membroj al SAT. K-do **Schram** tamen substrekas ke dum LEA-Komitato ne estis reprezentanto de SAT-Amikaro. K-dino **Pinet** asertas ke temas pri iu miskompreno ĉar k-dino **Chasard** devis esti reprezentantino de SAT-Amikaro, sed ŝi antaŭ sia forvojaĝo ne ricevis mandaton de SAT-Amikaro. K-do **Markov** konstatas ke SAT-Amikaro kiel ĉiuj havas siajn problemojn sed oni devas tamen konstati ke SAT-Amikaro tamen faras ian laboron por SAT ĉar ĉiumonate en “La Sago” aperas artikoloj pri SAT kaj oni neniam rifuzis al iu SAT-ano skribi pri SAT en ĝi. Se ne ĉiuj legas, tio estas alia demando. Pri la reprezentanto en LEA-Komitato k-dino **Chassard** estis telefone avertita de **Guy Cavalier** sed ŝi ne havis formalan mandaton, kaj ankaŭ ne raporton por prezenti. Fakte oni jam de jaroj ne faras al si demandon kion precize oni diskutas en tiu LEA-Komitato.

Rilatoj kun TANEF

K-do **Schram** informas ke TANEF ĉesigis sian agadon kaj ili donas la monon kiu restas en la kaso preskaŭ komplete al SAT. La espero estas ke TANEF iam reelcindiĝos, ĉar nun mankas la aktivuloj. Tio estas tre bedaŭrinda afero ĉar la celoj de TANEF estas vere bonegaj kaj utilegaj. TANEF instruas al laboristoj kaj iliaj infanoj pri la valoro de la naturo kaj pri la fakto ke la naturo estas nia estonto.

Landaj perantoj (sen interveno)

Sennaciulo

K-do **Westermayer** opiniaskeniricevastromulte da Sennaciuloj kaj ke estus bone malpliampleksigi la eldonon, ekzemple ĉiujn du monatojn. Dumonata ĵurnalo sufiĉus por niaj celoj.

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke ni ĉiam hezitis fari ion tian ĉar bedaŭrinde ni jam reduktis plurajn aferojn pro la financa situacio. Tiel ni ne plu povas eldoni la SAT-adresaron, Sennacieca Revuo ne aperos ĉijare. Sennaciulo estas la sola kaj unika ligilo inter niaj membroj, krom la kongreso, al kiu bedaŭrinde multaj ne povas partopreni. Ekzemple nia japana SAT-kolektivo estas sufiĉe granda, sed el ĝi eventuale partoprenas unu aŭ du reprezentantoj. Tiuj kamaradoj havas rilaton kun SAT nur pere de Sennaciulo. Do se ni limigas ankoraŭ tiun ligilon, mi timas ke la membroj ankoraŭ pli malaperos kaj tio estos la morto de SAT. Ni devas ĉion fari por malebligi ke la Asocio malaperu, ĉar ĝi estas necesa en la nuna mondo. Unufoje monate jam ne estas tre multe. Se estas nur ĉiun duan monaton kaj eble poste nur ĉiun trian, ĉar la situacio devigos nin tiel fari, estas la vojo al malapero.

K-do **Degoul** opinias ke la elekto resti membro de iu asocio ne dependas de la ofteco de la gazeto sed unue de la egzisto aŭ neegzisto de informo, tamen minimume unufoje jare. Dufoje jare estas akceptebla. Ankaŭ dependas de la seriozeco de la Asocio, la kohereco inter idealo de la asocio kaj la mia. La ofteco de la apero de gazeto ne estas unu el la plej gravaj elementoj. Pro tio li konsentas kun la propono.

K-dino **Toubale** informas ke pro la fakto ke ŝi loĝas en alia hemisfero (Aŭstralio) ŝi sentas sin dum la tuta jaro vere izolita, des pli ke tie estas tre malmultaj SAT-anoj. Verŝajne la japanoj havas la saman senton. Kiam ŝi vizitis Koreion ili ĉiuj estis ege kontentaj povi paroli kun SAT-ano. La gazeto alvenas plej frue monaton post la apero. Se oni havos nur ses numerojn jare, la tempo inter la numeroj estos tiom longa ke la informoj estos komplete kadukaj, speciale kiam oni petas agon pri io. Ŝi konscias ke finance estas ŝarĝo por la asocio sed se estos pli malofta la gazeto, por aŭstralianoj estos malfacile.

K-do **Pontnau** opinias ke la ofteco estas tamen grava. Kiam li estis juna li abonis ekz. al "Homo kaj kosmo" kiu estis duonjara kaj poste iĝis jara. Fine li forgesis reaboni ĝin pro ĝia malofteco. Li ne estas kontraŭ la reta eldono (kondiĉe ke ĝi estu atingebla nur per kodo), sed tamen la reta eldono ne havas la saman valoron kiel papera kiun oni tenas en siaj manoj.

K-do **Stuppnig** laboras en la komitato de IFEF kaj li diras ke ili ankaŭ duonigis la eldonon de ilia

periodaĵo. Ne okazis iaj plendoj, nek en Japanio nek el Ĉinio. Do, se tio plibonigos la SAT-financojn, SAT same faru. Kompreneble, tiam povos aperi en ĝi nur gravaj aferoj kaj ne io ajn.

K-do **Schram** estas por reta kaj papera eldono. Se ni povas ricevi monon por la reta eldono (PDF) tiam ni povos ŝpari sendokostojn kiuj estas tre altaj. Sed oni devas vidi ĉu ni gajnos ĉe la presado ĉar la nuna prezo estas por difinita kvanto (1000 ekz.). Se ni duonigas la kvanton, eble la prezo estos la sama kaj tiam tio ne estas avantaĝo.

Sennacieca Revuo (nenia komento)

Eldonoj-libroendado

K-do **Montagner** proponas sin por organizi pli bonan kontakton inter SAT kaj la libroservo de Itala E-Federacio.

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke ni ricevas mendojn de tiu libroservo de tempo al tempo.

K-do **Hernandez** proponas ke unu el la ĉefaj aspektoj de la eldonado estu la intereso de klientoj. Ekzemple en SATEH oni plej bone vendas "La Fremdulo"-n kiu estas tre konata verko. Oni do devas pensi pri tio ĉar ni bezonas vendi ilin kaj gajni monon.

K-do **Barkoviĉ** vere miras ĉar SAT praktike ne vendas ĝin (same kiel aliajn eldonaĵojn).

SAT kaj la reto

K-do **Barkoviĉ** informas ke nun estas novaj (novaspektaj) SAT-paĝoj kaj estus interese scii ĉu la membroj estas kontentaj aŭ ne.

K-do **Westermayer** diras ke SAT-diskutejoj troviĝas ĉe yahoo kaj li ne plu kunlaboras kun yahoo ĉar ĝi kunlaboras kun ĉina registaro kaj helpis al enkarcerigo de ĵurnalisto.

Filatela servo (nenia komento)

Poresperanta fako (nenia komento)

Frakcioj

K-do **Montagner** volas demandi pri eventuala nova frakcio, ĉar li ŝatas partopreni al la marŝoj por Paco kaj estus nepre necese havi Pacistan frakcion.

K-do **Barkoviĉ** diras ke li petis al gekamaradoj **Weiss** kiuj konkrete batalas por la paco, kontraŭ la kontraŭpersonaj minoj kaj aliaj tiaspecaj armiloj, ĉu ili akceptus gvidi la Pacistan Frakcion kaj ili akceptis.

Estus bone ke vi kontaktu kun ili por vidi kiel revivigi la frakcion.

K-do **Rooke** volas demandi pri la funkciado de la frakcioj. Li konsideras sin membro de la Komunista Frakcio, sed li ne scias kiel ĝi funkcias. Ĉu estas iu estro, ktp? Li volonte raportus pri la Komunista frakcio sed neniu petis tion de li kaj nenio aperas en Sennaciulo.

K-do **Schram** informas ke sur la paĝo 17 de la SAT-Statuto estas klarigita la funkciado de Frakcioj. La frakcioj mem organizas sian funkciadon ekster SAT, ĉar ili devas aktivi en propraj politikaj medioj. Ĉiu frakcio havas spacon por siaj komunikoj en Sennaciulo. Ili ankaŭ povas kunveni dum la SAT-kongresoj kaj informi la ĉeestantojn pri sia agado.

K-do **Barkoviĉ** klarigas kia estas la celo de la frakcioj: agadi en la kadro de la propra ideologia medio, propagandi ĉe ili Esperanton kaj SAT. Do, la celo ne estas frakciigi la SAT-anaron sed inverse agadi ekster SAT favore al SAT. Bonvolu rigardi la repaĝojn de la Komunista Frakcio kaj kontaktu kun frakciaj kamaradoj.

K-do **Westermayer** informas ke ili havis kunvenon de Ekologia Frakcio kaj demandas ĉu eblas uzi komputilon por sendi la raporton. Fakte, ekzistas uzeblo de komputiloj en la universitato. Ankaŭ li ne scias kiu estas estrarano de tiu frakcio.

K-do **Schram** opinias ke k-do **Westermayer** devus gvidi tiun ĉi frakcion. K-do **Montagner** demandas pri la nomo "frakcio": ĉu ĝi estas aktuala kaj bona por la nuna tempo.

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke ĝi estas tradicia ĉe SAT sed se iu opinias ke estus pli taŭga alia nomo, oni povas ŝanĝi.

Kongresoj

K-dino **Toubale** demandas ĉu estas io antaŭvidita por la venonta jaro?

K-do **Vinko Markov** respondas koncerne la eblecon pri Francio. Unue estis ideo pri la kongreso en urbo Plouezec. Bedaŭrinde la grupo kiu ĝis nun organizis tieajn renkontiĝojn maljuniĝis kaj ili ne kuraĝas organizi SAT-kongreson. Dua ebleco estis Gresillon kie la estraro ŝanĝiĝis kaj do tie ne eblas. Fine oni esploras en la Pariza regiono sed oni ne povas ankoraŭ diri la definitivon respondon. Tamen oni daŭre esploras kaj ni informos poste en Sennaciulo. K-do **Lynn** konstatas ke SAT-membroj pli kaj pli maljuniĝas kaj estus necese estonte kongresi en la domoj kiuj havas lifton.

K-do **Stuppnig** atentigas ke venontjare en majo okazos IFEF-kongreso en Parizo, kaj tio eble limigos la nombron de kongresantoj.

Oni voĉdonas pri la raporto de la PK: JES - la plimulto, NE:1, SINDETENO : 1. Per tio finiĝis la unua laborkunsido.

DUA LABORKUNSIDO

Prezidas k-do **Andrea Montagner**.

Financa situacio :

K-do **Jakvo Schram** diras ke la financa situacio de SAT estas malbona kaj ĉiuj povis legi en la julia numero de Sennaciulo la alvokon de la Plenum-Komitato por finance subteni SAT. Ni devas trovi la solvon, ĉar SAT havas certajn kostojn kiuj ĉiam revenas. Temas pri la kostoj de la domo (riparoj kaj prizorgado), la kostoj de administrado ktp. Montriĝas ke SAT ne plu kapablas pagi tiujn kostojn. Do oni devas trovi manieron por eliri el tiu malagrabra situacio. Venis propono de "amika grupo" ke simple oni maldungu nian salajrulon, k-don Barkoviĉ. Evidente tio estas unu el la ebloj. Sed, mi ne povas imagi ke SAT kiu sin prezentas kiel laborista asocio, kiel progresema asocio, faru simplan kapitalistan decidon kaj maldungu sian laboriston kiu laboras de pli ol 34 jaroj por la asocio. Estas alia ebleco vendi SAT-sidejon sed evidente tio estas en krizaj situacioj kaj ni nun troviĝas en tia krizo. Ni devas fari decidojn kiujn certe ĉiuj bedaŭras. La Plenum-Komitato jam de kelkaj jaroj diskutas pri la financaj problemoj kaj serĉas solvojn. Ĝi ĉiam esperis ke venos sufiĉe multaj novaj membroj por ke ni povu solvi tiamaniere la problemon. Se ni havus morgaŭ 300 pliajn membrojn, la problemoj estus solvita.

K-do **Prent** atentigas ke **Jakvo** ellasis gravan faktoron: fakte oni devas diri ke post 30 monatoj k-do **Barkoviĉ** emeritiĝos kaj la problemoj estas kovritaj tiujn 30 monatojn. Se ni maldungas lin, lia pensio estos pli malalta ol normale. SAT do bezonas sufiĉajn enspezojn ne por venontaj 10 jaroj sed por venontaj 30 monatoj. Poste SAT ne plu havos pagatan laboriston kaj povos funkcii per volontuloj kun malpli altaj elspezoj.

Jakvo aldonas ke li volis diri tion, sed tio estas malfacila momento por li mem kiu estis maldungita pro siaj socialaj agadoj kaj li scias kion tio signifas. Ni havas laboriston kiu ĉiam tre sindone kaj serioze laboras kaj nun ni estas en situacio ke eble ni devos maldungi lin. Kaj ni devas pripensi kiamaniere, ĉar estas unu kondiĉo por mi: mi persone kaj la membroj de la P.K. ne volas ke Kreŝo malgajnu eĉ centimon dum la 30 monatoj ĝis lia emeritiĝo. Mi demandas al vi, ĉu iu el vi havas ideojn aŭ proponojn kiuj eventuale povus helpi nin ĉar ni devas agadi. Estas la Plenum-Komitato kiu devas fari la finan decidon. Ni volonte aŭskultos viajn proponojn, kaj ni petas ke ni voĉdonu

pri tio ĉu la membroj (kongreso) donas sian fidon al la Plenum-Komitato de SAT por ke ĝi serĉu ĉiujn manierojn kiuj eblas kaj decas en la laborista asocio, konforme al ĝia Statuto. Nun vi povas fari demandojn kaj ni honeste respondos al vi. Tio estas nepra. Ankaŭ

io tre grava. Mi esperas ke en tiu ĉi salono troviĝas nur honestaj SAT-anoj, kaj ke ne estas iu kiu tuj iros al la retejo por trumpeti pri la situacio de SAT, por ke morgaŭ ne aperu en iu malamika gazeto kelkaj mensogoj kaj troigoj, la ĝojkrioj ke finfine SAT-bankrotas, malaperas, ĝi devas maldungi sian laboriston kaj vendi la



sidejon. Tio evidente nek utilis al Esperanto nek al SAT. Do vi havas vorton.

K-do **Hernandez** opinias ke en la nuna situacio estas du malsimilaj problemoj. La unua estas nekapablo pagi la salajron de Kreŝo kaj alia estas ĝenerala financa problemo. Pri la ĝenerala financa problemo mi parolos poste ĉar tio estas ligata al varbado kaj mi havas konkretan proponon pri tio, kondiĉe ke la SAT-anoj estus pretaj labori. Pri la salajro de Kreŝo, mia konkreta propono estas, ne vendi la sidejon, translokigi Kreŝon al la sidejo de SAT-Amikaro kaj ludoni la sidejon de SAT kaj per la enspezo de luprezo oni povus kovri la salajron de Kreŝo. Ĉar ŝajnas ke SAT-Amikaro havas problemon pri la deĵorantoj, Kreŝo povus ankaŭ deĵori por SAT-Amikaro. Se tio bone funkcios eble estonte oni povus havi alian dungiton kiu laborus samtempe por ambaŭ asocioj, kaj estus pagita per la ludonado de la nuna SAT-sidejo.

K-dino **Pinet** opinias ke tio estas interesa propono kaj certe SAT-Amikaro ne kontraŭos.

K-do **Barkoviĉ** intervenas dirante ke kiam estis unua kunveno kun la Komitato de SAT-Amikaro,

mi mem proponis ke mi laboru dum tri tagoj en la semajno por SAT-amikaro kaj aliajn tri tagojn por SAT (mi ne diris kiom da horoj tage), la respondo estis ke ili ne povas nek volas pagi min ĉar ili bezonas junulon kiu venos kaj por kiu la ŝtato pagos 70% de la

minimuma salajro (SMIC). Tiamaniere SAT-Amikaro preskaŭ pagos nenion. Evidente ili devas unue formi tiun junulon, instrui al li Esperanton kaj poste kiam li lernos, eble li devos foriri. La alia reago estis: Sed fakte, se vi povas labori tri tagojn por ni kaj tri tagojn por SAT, tio signifas ke vi ne havas laboron en SAT kaj ke vi nenion faras. Tio ne estas vera ĉar mi laboras ofte sabate kaj eĉ foje dimanĉe. Tiu reago estis tre ŝoka por mi kaj en la nuna situacio ili ne estas pretaj helpi. Ĉu ili ŝanĝos la opinion mi ne scias.

K-do **Hernandez** diras ke lia propono estas tute alia. Li proponas ke ili havu deĵoranton senpage ĉar tiu deĵoranto estos pagata per la mono de la ludonado de la sidejo. Krome, post via emeritiĝo, per tiu mono oni povus pagi alian deĵoranton (juna se ili volas), kiu laborus por ambaŭ asocioj. Do mi proponas senpagan deĵoranton al SAT-Amikaro.

K-dino **Toubale** konas la sidejon de SAT kaj demandas al parizanoj, ĉu ili kredas realiste ke la lupago por tiu sidejo povus egali la salajron de Kreŝo?

K-do **Enderby** demandas kiom da scio UEA havas pri tiu krizo, ĉar oni ne devus havi embarason

pri tio. Almenaŭ unu aŭ du influhavaj homoj ĉe UEA kiel Renato Corssetti aŭ eble Humpry Tonkin kiuj simpatias kun SAT povus neformale kun unu aŭ du SAT-respondeculoj preparoli la aferon. Eble UEA povus provizore helpi. Se vi konsideras ke tio estus ebla, mi estas preta kontakti ekzemple Renaton kaj Humpry, simple por klarigi al ili. Eble ia helpo povus veni.

K-do **Markov** respondas al la demando de Franciska pri la eventuala luebleco de la sidejo. Unue estas praktika problemo ke la sidejon oni devus komplete malplenigi kaj nun ĝi estas plena de libroj kaj de alia materialo. Kien stoki tion. Ankaŭ la arkivojn. Due, en tiu sidejo interne tute ne estas akvo kaj ne eblas ĝin transformi al loĝejo sen altaj kostoj. Por butikoj ĝi estas iom fora, ĉar ĝi estas en la tria korto de pariza domo kaj ne povas esti utiligita tiel. Do, ĝi povus nur utili al iu entrepreno por tie stoki la materialon. La demando estas ĉu entrepreno pretus pagi la sumon, kiun oni bezonas ĉiumonate por la salajro, do almenaŭ 3000 € el kiuj 1100 € estas por sociaj ŝarĝoj.

K-dino **Viola** demandas al Kreŝo kiajn planojn li havas post sia emeritiĝo?

K-do **Westermayer** proponas redukti la kvanton de Sennaciuloj al 6 numeroj jare kaj tiel ŝpari la monon. Ankaŭ li proponas ke oni uzu la adresaron de IJK (Internacia Junulara Kongreso) por varbi inter ili por SAT.

K-do **Morankiĉ** proponas ke oni ne vendu la sidejon ĉar ĝi servos ankoraŭ dum sekvontaj cent jaroj. Oni devas esplori ĉiujn proponojn, eventuale pri kreditoj ktp, kaj la PK devos fine decidi. Oni nepre ne vendu nemoveblaĵon.

K-do **Barkoviĉ** respondas al k-dino **Viola** ke post sia emeritiĝo li restos daŭre aktiva membro de SAT. Li ne plu estos ŝarĝo sed provos alporti tion kion liaj kapabloj ebligas. Li ne alkroĉiĝas al sia posteno kaj esperas ke la pli junaj transprenos la torĉon. Li tamen restos je la dispono de SAT kiam la Asocio bezonos lin.

K-dino **Chassard** klarigas al k-do Westermayer ke s-ino Ursula petis ke la junuloj subskribu saluton al la SAT-kongreso kaj multaj subskribis sed ne notis siajn adresojn. Oni ne povas kontakti ilin.

K-do **Degoul** tenas en la manoj financon raporton 2005. Li starigas du demandojn. Unua demando: kiom da mono oni bezonas? Dua demando: Kiel havi la monon? Lia ideo estas ke tiu problemo estas plurmaniere solvebla. Do kiom da mono oni bezonas? Oni bezonas salajrojn kaj sociajn ŝarĝojn por la daŭro de 30 monatoj. Laŭ bilanco salajro malneta estas proksimume 32000 € jare, sociaj ŝarĝoj

15000 € do entute proksimume 48000 por unu jaro. Por 30 monatoj tio estas 124000 €. El tiuj 124000 ni jam posedas en rezervo 18000 \$. Tiu rezervo estas antaŭvidita por kovri eventualajn kostojn de maldungo. Se ni konservas la salajrulon ne estos tiu kosto. Do la vera kosto estos 124000 minus 18000. Tio estas 106000. Mi pensas ke tiu sumo estas trovebla. La unua maniero estas elspezi malpli. Jam estas proponite ke oni malpli ofte eldonu Sennaciulon. Ĝi kovrus proksimume 15 % de la kosto. Dua ebleco estas pruntepreni monon. Tio havas malavantaĝon ĉar la estonteco de SAT ne estas tre klara. Do tiu kiu pruntedonas ne estas komplete certa ke li retrovos la monon, sed kelkaj estas pretaj riski. K-do Enderby proponis sin kontakti kun UEA kaj mi faros la samon ĉe la E-Civito. Ni vidos la respondon. Estas ankaŭ la LEA-oj. Eble ili povus ankaŭ prunti al SAT monon. La tria solvo estas donacoj. Kaj la kvara solvo kaj la plej grava estas kreo de dumviva membreco kio ekzistas ĉe aliaj asocioj. Mi estas preta iĝi dumviva membro de SAT kvankam mi tute ne estas certa ĉu post 30 jaroj mi ankoraŭ vivos kaj SAT ekzistos. Tio estas veto. Kiom da jaroj oni povus proponi? Mi pensas ke 25 aŭ 30 estas bone. Se ni kalkulas ke por riĉaj landoj la dumviva kotizo estus 1500 € kaj se ni trovas 70 personojn kiuj iĝus dumvivaj membroj la problemo estus solvita. 70 ne estas enorma kvanto. Mi mem volonte donus monon al SAT ĉar mi estas riĉa laboristo kaj laŭ mi estas sufiĉe multaj riĉaj laboristoj kiuj povus fari same. Do mi faros. Se ni konstatas ke post kelkaj monatoj estas nur kelkaj personoj kiuj tion faras, tiam la PK devos maldungi nian laboriston, sed mi esperas ke post kelkaj monatoj ni havos sufiĉe da dumvivaj membroj por solvi tiun problemon.

K-dino **Zofia Banet-Fornalowa** opinias ke ĉiuj tiuj proponoj estas interesaj kaj ke oni devas ĉiujn serioze pritrakti. Eble oni povus ludoni nur parton de la sidejo. Neniu el eksaj socialistaj landoj povas pagi 1000 eŭrojn, sed oni povas krei fonduson kaj ĉiu donu kiom li povas. Krome oni devus draste malgrandigi la elspezojn.

K-do **Barkoviĉ** reagis al la propono malgrandigi la elspezojn. Jam ni malaltigis la elspezojn plej multe eble. Pri Sennaciulo li klarigas ke se ni malaltigas la eldonkvanton tio ne multe helpas ĉar tio ne kostas multe malpli (nun oni presas 1000 ekz.). Poŝtafranko estas kosta kvankam ni pagas laŭ speciala tarifo por gazetoj, sed por havi tiun rajton oni devas ekspedi 1000 ekz. Se oni sendus nur 400 ekz. ĉar la aliaj havus elektronikan en PDF, por havi tiun apartan tarifon, ni tamen devus deklari 1000 ekz. Nun ni ne pagas la telefonon ĉar nia internet servejo donas al ni senpagan telefonon. Tio estas ankaŭ ŝparo (ĉar oni

pagas nur 29,90 € por internet kaj telefono monate). SAT pagas al mi la partoprenon al la kongreso ĉar ĝi estas parto de mia laboro, ĉar mi ne povas pagi per mia “granda” salajro. Pro tio mi neniam partoprenas la SAT-Amikarajn kongresojn. Pri la sesmonata apero de Sennaciulo, tio povus havi malbonan efikon ĉar por gekamaradoj el foraj landoj (Japanio, Ĉinio, Aŭstralio, Brazilo), kiuj ne povas veni al kongresoj, Sennaciulo estas la sola ligo kun la Asocio. Se ili ricevos ankaŭ ĝin nur sesfoje jare, ili eble ne plu pagos la kotizon.

K-do **Hernandez** kontraŭas la plialtigon de la kotizo, ĉar estas multaj gekamaradoj kiuj apenaŭ povas pagi la kotizon. Same estas pri la junuloj. Se ni volas varbi la junulojn ni ne devas plialtigi la kotizojn. La plej grava aktiveco devas esti varbado kiu certigos la estonton de SAT.

K-do **Schram** substrekas ke la diskuto ne estas pri Kreŝo sed pri la financa situacio de SAT. Kreŝo estas nur parto de tiu situacio. Sed li ne kulpas pri ĝi kaj ne estas iu malbonulo en tiu situacio. Do, ĉiuj ideoj estas bonvenaj por helpi al la PK solvi la problemon.

K-do **Westermayer** demandas al k-do Barkoviĉ kiom da mono oni ŝparus se oni reduktos Sennaciulon al 6 numeroj jare. Por havi pli ol mil membrojn oni devas ĉefe varbadi kaj puŝi LEA-ojn varbi, kiel eble plej, novajn membrojn al SAT. Li proponas subtenan kotizon kiu povus esti 30% pli alta.

K-do **Barkoviĉ** respondas ke la presado kostas iom pli ol 600 € kaj se ni havus kvin numerojn malpli tio estus 3000 € da ŝparo. Al tio aldoniĝas la afranko. Do ni diru ke la ŝparo estus ĉirkaŭ 6000 €.

K-dino **Viola** konsentas pri duonigo de aperritmo de Sennaciulo. Ŝi ne pensas ke la membroj estas izolitaj ne ricevante Sennaciulon ĉar en tiuj landoj la plej multaj homoj havas interreton. Se ili volas, ili havas rimedon por kontaktoj. Ŝi ne kredas ke japanaj kamaradoj tre atente legas Sennaciulon, sed ili estas ĉiam pretaj pagi kotizon pro solidareco kaj tio estas rilato kun SAT. Ni povas plibonigi la enhavon. Kiam temas pri Ĉinio kaj kelkaj aliaj landoj kiuj pagas malpli multe ol aliaj riĉaj landoj kaj ricevas tiun altekoston organon, mi deziras scii ĉu vere ili deziras ĉiumonate havi ĝin, ĉu ili vere legas ĝin? Ĉu ili kontribuas per artikoloj al ĝi? Mi deziras plialtigi la kvaliton de membroj.

K-do **Prent** volas pridiskuti la ciferojn kiujn donis k-do Degoul. Li kalkulis la **elspezojn** kiel 15000 € por la presado kaj ekspedo. La domŝarĝoj 2000 €, kaj en ceteraĵoj, aferoj kiujn oni ne povas forigi kaj kiuj proksimumas 5000 € kaj tio jam sumas 22000 €. Laŭ ciferoj de 2005 la salajro kaj la ŝarĝoj estas 48000 €, do entute jare estas 70000 €. Tio por tri jaroj donas la sumon de 210000 €. Tamen el tio li

deprenas 24000, ĉar dum tiu tempo Kreŝo emeritiĝos kaj kelkaj el tiuj ŝarĝoj malaperos. Do tio estas 185000 € por tri jaroj proksimume. **Enspezoj**: laŭ ciferoj de 2005, mi estos iom optimista ke ni ricevu en tri jaroj 150000 €. La diferenco inter enspezoj kaj elspezoj estas 35000 €. Evidente, tiuj ciferoj estas proksi-mumaj. Laŭ Tereza estus proksimume 40000 € necesaj por kovri tiun periodon. Se ni ŝparus iom per Sennaciulo kaj tion devas diri la kongreso al la PK ke ili plene esploru la aferon kaj faru la decidon laŭ eltrovo. Laŭ li, nur ses numeroj de Sennaciulo kaj unu Sennacieca Revuo estus pli bona ol 11 Sennaciuloj sen SR. Laŭ lia sperto kiel peranto en Britio, nur tiuj kiuj ne povas pagi plenan kotizon, pagas duonan. Pri LEAoj, SATEB jam faris donacon por helpi al la SAT-situacio.

K-do **Pontnau** opinias ke ni malmulte ŝparos per redukto de Sennaciulo al ses ekzempleroj kaj ĝi havos psikologiajn sekvojn. Do la membraro povas malkreski. Se oni havas malmultan kontakton kun la organizo, ĝi malpli gravas. La sola realista alternativo ŝajnas la ludonado de la sidejo (prefere ol vendado). La dungo de junulo validas por unu jaro. Do kiam oni dungas tian junulon oni instruas al li/ŝi la lingvon kaj laboron, kaj post unu jaro kiam li/ŝi lernis, oni devas maldungi lin/ŝin. Tio estas tute stulta sistemo de la franca ŝtato.

K-do **Schram** klarigas ke bedaŭrinde la probableco de la maldungo de Kreŝo estas tre reala. Sed se oni maldungas lin, li kaj ĉiuj PK-anoj, volas ĉion fari por ke Kreŝo ne perdu unu centimon ĝis sia emeritiĝo. Do, la salajro devas estis garantiata. Nun ni nur devas diskuti kiel tion fari. Se ni maldungas Kreŝon ni ne plu havos socialajn ŝarĝojn por pagi kaj tio estas serioza sumo. Sed ni devas elturniĝi por pagi al li la diferencon por ke li havu normalan salajron kaj povu normale vivi kun sia familio.

K-do **Hernandez** kontentigas ke multaj intervenas. Li parolas pri la sendo de Sennaciulo. Oni esploru ĉu, se oni sendas nur 500 Sennaciulojn monate ni ŝparos la monon. Li ne komprenas kia estas la problemo, se oni maldungas nun Kreŝon - pagas al li plenan salajron kaj poste li havos plenan pension. Certe en tiu kazo la posta pensio estos malpli alta ol normale.

K-do **Mickle** proponas, ke se neniu el proponoj montriĝos sufiĉe fruktodonaj oni povus pensi pri la vendo de sidejo, ĉar estas evidente ke la laboroj en SAT tute ŝanĝiĝos kiam ne plu estos pagata oficisto. La oficejo de SAT troviĝos en la komputiloj de individuoj kiuj plenumos taskojn. Tiam estos eĉ demando ĉu SAT povos daŭre sufiĉe uzi la oficejon. Kompreneble, oni devus trovi taŭgajn solvojn por la arkivoj kaj la librostokoj. Li mem evidente ne tre ŝatas tiun solvon

sed oni ne neglektu ĝin se la aliaj proponoj montriĝas ne sufiĉe kontentigaj.

K-do **Barkoviĉ** donas kelkajn klarigojn. Estis unue propono ke oni tuj emeritigu min, ĉar laŭ la franca leĝo, kiam oni estas 60-jara oni rajtas emeritiĝi. Sed tio estas anticipa emeritiĝo kun konsekvenco ke la pensio estas sufiĉe malpli alta ol la plena pensio kaj mi tion rifuzas. La dua ebleco estas maldungo, kion mi ne povas rifuzi, pro la malbona financa situacio de SAT. En kazo de maldungo, mi restas ĝis la emeritiĝo (65-jara) nelaboranta laboristo, kaj mi ricevos monatan rekompencan de t.n. ASSEDIC (socia asekuro al kiu oni kotizas dum laborjaroj). Tiu monata rekompenco estus 700 € malpli ol la nuna salajro. Tiel estus ĝis mia emeritiĝo. Dum la maldunga periodo ne plu estus pago al la deviga suplementa pensia kazo, kaj en la momento de pensiigo tiu suplementa estos malpli granda. Mi ĉiam laboris por SAT kun entuziasmo kaj kontraŭ malalta salajro, sciante ke la asocio ne havas monon. Kiam vizitis nin laborinspektorino, ŝi miris ke mi akceptas labori kontraŭ tia salajro, kaj mi respondis al ŝi ke bedaŭrinde tiel estas ĉar la asocio ne havas monon. Tiam ŝi respondis: Se vi akceptas, tiam tio estas via afero. En la kazo de maldungo, leĝe mi ne rajtus labori por SAT. Do mi povus tamen iom aranĝi la aferon kaj parton de mia laboro fari hejme, sed alian parton kiel pakado de libroj, la afrankado kaj transporo al la poŝto, tion mi ne povus fari en mia hejmo.

K-do **Lynn**: mi volas ke la protokolo estu korekta. Mi miksis du kunvenojn en mia kapo kaj mi pardonpetas al la hispanaj kamaradoj. Sed dum mi estas ĉi tie mi volas diri ion pri Sennaciulo. La papera formo de la ĵurnalo estas tre grava, ĉar ĝi estas propagandilo por SAT. Oni povas porti ĝin al diversaj kunvenoj ktp, dum ne estas porti la komputilon.

K-do **David Kelso** opinias ke ĉar SAT kaj SAT-Amikaro troviĝas en la sama urbo, ili nepre devas interparoli pri tiu krizo kaj serĉi kune solvojn. Oni lanĉis diversajn ideojn kaj tamen ne unu kiu estas en mia kapo. Oni parolis por eventala vendo de sidejo kaj kontraŭ la vendo. Nu estus ebla la meza vojo. Oni povas parte vendi la sidejon.

K-do **Degoul** klarigas ke kiam li intervenis li ne havis ĉiujn informojn de la Plenum-Komitato. Kelkaj el ĵus faritaj proponoj ŝajnas al li ne tre realismaj. Solvo de maldungo ne estas ankaŭ tre bona ĉar unue li perdos monon (malpli da pensio post emeritiĝo) kaj krome ĝi estus pli-malpli kaŝita afero. Do restas du eblecoj sufiĉe esplorindaj. La unua estas pri la ofteco de la apero de Sennaciulo. Eventuala ekonomio de tiu solvo (nur 6 numeroj jare) estus ĉirkaŭ 6000 € jare, do ĝis 2009 15000 €. Pri tiu solvo la kongreso devus

esprimiĝi. La dua solvo estus dumvivaj membrecoj.

K-do **Rooke** pensas pri la enspezfontoj de SAT. Eble ĝi povus oferti iajn servojn?

K-do **Pontnau** opinias ke ĉiuj tiuj solvoj estas nesufiĉe rapidaj. Ŝajnas ke neniu konscias pri la graveco de la situacio. Ni devas trovi solvojn tuj. Se ni ne trovos solvon, la Asocio bankrotos kaj tiam estos ŝuldoj kiujn oni devos repagi. Oni vendos la sidejon aŭkcie je tre malalta prezo kaj ankaŭ Kreŝo perdos ĉion. Restos nenio.

K-do **Schram** diras ke la situacio estas tre serioza. Nun kelkaj homoj diris al mi ke oni ne sciis ke la financa situacio estas tiel malbona. Vere tion mi ne bone komprenas. Mi aliĝis al SAT antaŭ 15 jaroj kaj ekde la komenco mi sciis ke mi estas membro de la asocio kiu ne havas monon. Kiam mi iĝis prezidanto de la PK mi sciis ankoraŭ pli pri la situacio kaj mi ofte parolis kun Kreŝo per skype por eviti la kostojn. Mi demandis al Kreŝo kio estas la konsekvencoj se SAT bankrotas. Evidente la PK respondecas pri la Asocio, ĉar tio estas leĝo. Kaj estas konsekvencoj de la bankroto. Ni evitu bankroton, ĉar bankroto estas la fino de SAT, kaj tion neniu el ni volas. Bankroto signifas ke Kreŝo tuj perdos la monatan enspezon kaj oni lin tuj emeritigas kun tre reduktita enspezo. Tio estus vere katastrofo kaj mi ne volas vivi kun tiu ideo. Ni ankaŭ perdus la sidejon. Ne plu temus pri vendo de sidejo, sed oni vendus ĝin aŭkcie je plej malalta prezo. Mi ege bedaŭras ke mi nun devas pafi kontraŭ SAT-Amikaro, sed ni ricevis tre malĝentilan, tre malkamaradan leteron subskribitan de Jean Selle, en kiu oni simple diras, maldungu la laboriston. Kvazaŭ estas besto kiun oni devas forĵeti. Mi tre koleras pri tiu letero. Ili kvazaŭ miregas ke tiu financa situacio subite falas el la ĉielo. Ĉu oni ne legas Sennaciulon en SAT-Amikaro? Mi jam sciis unu jaron post mia aliĝo ke la financa situacio de SAT estas ege malbona. Ekde kiam mi agadis en Ĝenerala Konsilantaro kaj poste en la Plenum-Komitato mi ĉiam esploris kiuj estas la ebloj. Mi skribis al kamaradoj kun demandoj kio povas okazi kaj kia estas la situacio en Francio. Oni fanfaronas pri Eŭropo kaj Eŭropa komunumo sed nun mi scias ke se Kreŝo laborus en Belgio, estus neniu problemo. Sed en la lando de la granda revolucio estas giganta problemo. Tio ege dolorigas min. Tio signifas ke universala solidareco absolute ne ekzistas. Mi ankaŭ ĉiam atentigis la homojn ke oni ne plu parolu pri riĉaj kaj malriĉaj landoj, sed pri membroj kiuj povas pagi kaj tiuj kiuj ne povas pagi. Mi ĵus estis en Perpignan (Francio) kaj en la kvartalo kie mi estis, vivas homoj kiuj verŝajne malfacile povus pagi, sed ĉi tie en Beogrado mi vidis domojn en kiuj loĝas homoj kiuj certe sen problemoj povus pagi 100 €. Mi

ne montrofringras al iu ajn sed mi nur demandas ke tiuj kiuj povas pagi pli ol la kotizon bonvolu aldoni iom da mono kaj donaci al SAT. Tiel vi helpas la Asocion. Ankaŭ mi demandas al la kongreso: Ĉu vi povas fidi al la Plenum-Komitato? Ĉu vi permesas al la Plenum-Komitato ke ĝi agadu laŭ la plej bona maniero por savi la sidejon, por konservi la laborlokon de Kreŝo (kio estas la plej grava), aŭ la salajron de Kreŝo. Tiel ke li havu garantion ke ĝis la emeritiĝo li ricevos de SAT ĉiumonate la salajron kiun li ricevas ĝis nun (kvankam li meritas eĉ multe pli). Mi scias ke en tiu ĉi kongreso ni ne povas havi solvon, sed el ĉiuj viaj ideoj kaj proponoj la PK devas trovi la plej bonan solvon. Mi proponas la voĉdonon pri: Ĉu jes aŭ ne vi akceptas ke la PK agadu tiel, kiel estos plej bone por SAT kaj por Kreŝo, eĉ se ni devas alpreni decidojn kiuj emocie estas tre gravaj. Imagu se mi morgaŭ devus diri al Kreŝo, ke ni devas maldungi lin, tio doloros same multe min kiel lin. KREDU MIN, mi scias kio estas perdi laboron.

K-do **Stuppnig** konstatas ke ĉi tie oni parolas pri la maldungo de laboristo, sed neniuj parolas kiu poste faros la laboron. Ĉu jam estas iuj solvoj? Pro tio nia prezidanto bone diris ke oni lasu la decidon al la PK, ĉar surloke oni plej bone konas la situacion kaj kondiĉojn, ne nur leĝajn de la ŝtato, sed ankaŭ kiel organizi la laboron en la Asocio mem. Kiam oni parolas pri la nepra konservado de iu ejo oni bone pripensu ĉu oni bezonos estontece tiun ejon se neniuj laboros en ĝi. Do ni voĉdonu pri la propono de Jakvo.

K-do **Huszar** diras ke la lasta parolado de la prezidanto kuraĝigis lin interveni. Ja, temas pri tiu organizo SAT-Amikaro. Kia amikaro de SAT ĝi estas se ĝi ne pretas helpi en la situacio kiam SAT bezonas helpon.

K-do **Kessous** estas tute favora doni povon al la PK decidi por ke la solvo estu same favora por SAT kaj por Kreŝo, kaj eĉ por SAT-Amikaro.

K-do **Degoul**, diras ke la tempo pasas kaj oni devos doni la povon al la PK solvi la problemon. Sed, grava avantaĝo de SAT kadre de esperantio estas ke ĝi estas la sola rekte demokrata asocio kaj ĉar ni havas ankoraŭ 30 minutojn mi uzas por diri ion. Jakvo diris ke de multaj jaroj ni sciis ke SAT ne havas sufiĉe da membroj kaj ke la tendenco estas havi pli da elspezoj ol enspezoj. Sed nur ricevante la julian numeron de Sennaciulo mi eksciis ke estas risko maldungi la laboriston. Kaj nur antaŭ 20 minutoj mi komprenis, kaj tio senvalorigas miajn antaŭajn intervenojn, ke la situacio urĝas ĉar ne plu restas en la kaso tiom da mono, kiom ni eksciis en la bilanco. Mi do ŝatus scii kiom da mono en la nuna momento restas en la kaso.

K-do **Westermayer** proponas ke oni opiniondadu en la kongreso pri la ŝanĝo de aperritmo de Sennaciulo.

K-do **Barkoviĉ** respondas al la demando de k-do Degoul pri la mono. Fakte, estas nefacile diri. Ekzemple la stoko de nia PIV aperas en la bilanco kaj ĝi havas grandan valoron. Se ni morgaŭ vendus ĝin la afero estus solvita. En la bilanco ĝi aperas kiel valoro (mono) sed momente ĝi estas morta kapitalo, kaj tio iamaniere falsas la informojn en la bilanco, ĉar tiu valoro ne estas en la kaso. Ni havas ĝin kaj praktike ne havas. La vera mona situacio estas tiu kiom da mono nun, en tiu ĉi momento, troviĝas en la kaso. Se ne okazas iu miraklo (vendoj, donacoj, ktp), laŭ la nuna mona situacio oni povos pagi mian salajron de aŭgusto kaj verŝajne septembro. La 15-an de oktobro oni devos pagi trimonatajn socialajn ŝarĝojn kaj verŝajne oni ne plu povos pagi ilin. La plej granda katastrofo kiu povus okazi estas ne pagi la ŝarĝojn. Do, oni devus trovi la monon por nepre tion pagi.

K-do **Hernandez** diras ke ne estas iu ajn kontraŭdiro inter la interesoj de Kreŝo kaj tiuj de SAT. Li proponas ke oni eĉ ne voĉdonu sed la PK mem faru tiel kiel estas plej bone.

K-do **prezidanto Andrea** resumas la proponojn ke oni voĉdonu por doni mandaton al la PK fari tiel kiel estas plej bone por SAT kaj por Kreŝo, kaj ke oni sondadu pri eventuala ŝanĝo de aperritmo de Sennaciulo.

K-dino **Toubale** opinias ke oni tuj voĉdonu por ke tio estu en la protokolo, por ke poste neniuj povu tion kontesti.

K-dino **Stoilova** petas ke oni ne plialtigu la kotizon, ĉar bulgaroj ne povos pagi. Ĉi tie estas tri bulgaroj kaj la meza pensio de ili tri estas ĉirkaŭ 50 eŭroj.

Oni voĉdonas pri: Doni al la PK mandaton por ke ĝi trovi la plej bonan solvon por SAT kaj por k-do Barkoviĉ.

Rezultato: por 39, kontraŭ 1, sindeteno 2.

K-do **Schram** konkludas ke tio do ne estas fino de SAT. Venas novaj homoj kun novaj ideoj kaj SAT estas daŭre vigla kaj daŭre fosas sian sulkon. La problemo de SAT, manko de mono, estas monda problemo de laboristoj, kaj do la asocio suferas.

K-dino **Colette Weiss** invitas ĉiujn al la ĵaŭda kunveno de pacistoj pri ago de la kongreso koncerne la pafaĵojetojn el bomboj kaj la proponon por la kongresa Deklaracio pri la sama temo.

K-do **Vinko Markov** donas klarigojn pri la propono al la kongreso rilate al la kooperativa eldonfako, kiu aperis en julia Sennaciulo. Lia

propono estas ke SAT pli vigle kontaktu kun diversaj libroservoj por provi pli vendi siajn eldonaĵojn.

K-dino **Weiss** nun diras sian propran opinion kaj tiun de ŝia edzo. En la raporto de la PK oni indikas ke la SAT-eldonaĵoj malbone vendiĝas kaj la librostokoj iĝas morta kapitalo. Eĉ la malpli altigo de prezoj aŭ specialaj ofertoj ne ŝanĝas tion. Ili demandas sin kiu donos al la eldonfako la komencan kapitalon kaj al kio servos eldonado se oni ne vendas la eldonaĵojn? Kiu kompensas eventuala deficiton? Do ili kontraŭas la kreon de tiu fako kaj opinias ke nur la PK povas decidi pri la eldonado.

K-do **Markov** klarigas pli detale, ĉar sajnus ke estas miskomprenoj. Unue tiu propono aperis en Sennaciulo kaj tio signifas ke la PK legis ĝin kaj konsideris ĝin aperinda, kaj ke ĝi ne kontraŭas la interesojn de SAT. Due, inter la subskribintoj estas du membroj de la P.K. Tiu propono estas parto de la plano por la estonteco. Iuj demandis, kiel SAT funkcios post Kreŝo? Tiu kooperativo estas parto de la plano pri la funkciado post Kreŝo. Ĝis nun, la mono de venditaj libroj estis parte uzita por pagi la salajron de Kreŝo kio estas tute normala. Sed estas fakto ke multaj libroj ne aperis (kaj tio estas tamen unu el aktivecoj de SAT) pro manko de mono. De kie venos la mono? SAT-Amikaro ne deziras doni monon por la salajro de Kreŝo sed pretas doni monon por io konkreta kiel tiu kooperativo. Krome la celo de la kooperativo estas ĝuste ke oni presu ion nur kiam oni havas la monon. Do ne estos defcito ĉar oni atendas por havi monon. Se mono alvenas, oni faros ion, kaj se ne, oni faras nenion. Ĉar temas pri kooperativo, la unua afero estas repagi la ŝuldon al la pruntanto. Tio eblos post la emeritiĝo de Kreŝo. Do estos provperiodo ĝis tiu emeritiĝo. Tio tamen montros al la aliaj ke malgraŭ niaj problemoj SAT planas kaj kreas ion novan, kaj preparas sian estontecon.

K-do **Mickle** aldonas ke en plano estas parto kiu planas la retan eldonadon, kio ne elsuĉos multe da mono.

K-do **Markov** forgesis diri ion. Oni jam diskutis pri la eldono de la libro pri Koreio kaj oni konstatis fuŝan situacion, ke Franciska entute faris traduklaboron, sen antaŭe esplori ĉu la libro estus eldonebla aŭ ne, kaj ĉu indas traduki 200-paĝan libron pri tiu temo, ĉu estos homoj pretaj aĉeti ĝin. Kiam oni faris laboron por SAT estas malfacile diri ke li/ŝi laboris por nenio. La kooperativo devus anticipi ĉion esplori antaŭ ol decidi pri la traduklaboro.

K-do **Morankiĉ** subtenas tiun proponon kaj ĉiujn aliajn kiuj ne tuŝas finance la nunan situacion de SAT.

K-do **Degoul** demandas ĉu la Broŝurservo

de SAT (Kribo) ne estas jam io kio konkurencus la kooperativon?

K-do **Markov** substrekas ke tiu Broŝurservo funkcias tute memstare. K-do **Kribo** eldonas ĉion per propra kapitalo, kaj nur li decidas pri tio kio estas eldoninda aŭ ne. Ne estas diskuto kaj planado interkonsente kun la PK de SAT. Sed, se k-do Kribo estas preta kunlabori kun la nova kooperativo, oni tion volonte akceptos.

K-dino **Chassard** estas kvazaŭ najbarino de **Christian Baudé (Kribo)**, diras ke ne estas li mem kiu financas la Broŝurservon sed estas kaso de la grupo kiu heredis tion de la "Juna Penso" (organo de SAT-Junulfako).

Oni voĉdonas pri la starigo de la kooperativo: **kontraŭ estas 2, sindetenoj 20, por 19.**

Kongreso havas nur konsultan karakteron kaj la propono iras al la ĝenerala referendumo.

Per tio finiĝas la dua laborkunsido.

TRIA LABORKUNSIDO

Prezidas k-dino Franciska Toubale

Por tiu ĉi kunveno estas antaŭviditaj kvar temoj kiuj estos enkondukitaj de kvar gekamaradoj kaj post ĉiu enkonduko estos ĝenerala diskuto. La tri laborhorojn oni devos disdividi je kvar partoj. La kvar temoj estas:

1. **Eventoj en Francio - manifestacio kontraŭ ŝanĝoj en laborkondiĉoj** (enkonduko: Vinko Markov)
2. **Naciismo kaj edukado** (enkonduko: Viola Murasaki)
3. **Ĉu SAT prezentu Esperanton samstile kiel Neŭtrala movado** (enkonduko: Gary Mickle)
4. **Pri la problemoj en Mezoriento** (enkonduko : Djemil Kessous)

Unuan temon enkondukas Vinko Markov:

Kio okazis en Francio dum tiu ĉi printempo?

De februaro ĝis aprilo, okazis en Francio la plej multnombraj strataj manifestacioj ekde 1968. La komenca celo estis protestado kontraŭ la Kontrakto por Unua Dungo (CPE). Temis pri kontrakto por junuloj malpli ol 26 jarojn aĝaj, kiu enkondukis dujaran provperiodon, dum kiu la laboristoj povas esti senmotive maldungitaj. Tiu skandala propono provokis amasajn protestojn ne nur de la junaj

laboristoj, sed ankaŭ de studentoj kaj liceanoj, kiuj unuiĝis ĉirkaŭ la samaj postuloj, kun la apogo de la malpli junaj laboristoj.

Pro la kreskanta mobiliziĝo fronte al ĉiam pli obstina kaj kaŝe perfortema registaro, la kontestado etendiĝis al la peto pri forigo de du aliaj novaĵoj:

- Unu estis la ĝemela frato de la KUD, tio estas la NovDunga Kontrakto (CNE), kiu ebligas same facilajn maldungojn sen aĝolimoj por la entreprenoj kun malpli ol 20 salajruloj.
- Dua skandalaĵo estas la leĝo ironie nomita « pri egaleco de la ŝancoj », kiun la registaro prezentis responde al la novembraĵoj tumultoj en francaj ĉirkaŭurboj. Tiu leĝo malaltigas la aĝon de eklaboro de 16 al 14 jaroj, enkondukas la noktan laboron ekde 15 jaroj, kaj ebligas forprenon de financaj subvencioj por familioj, en kiuj la infanoj ne regule vizitas lernejon.

La tuto konkludiĝis per forpreno de la KUD meze de aprilo, sed plu restas la KND kaj la leĝo pri « egaleco de la ŝancoj ».

Pozitivaj punktoj:

- La forpreno de la KUD estis provizora kaj nur parteta haltigo de la detruo de la laborleĝo, pro fortoelmonro flanko de la proletaro, kaj ĝi montris ke amasa mobiliziĝo povas konduki al konkreta rezulto.
- Temis pri amasa movado, en kiu partoprenis ne rekte koncernataj homoj, el kiuj multaj junuloj. Tio lasas esperi pri ioma kresko de la meza klaskonscio, ĉefe ĉe la novaj generacioj.
- La tuta batalo havis gravan edukon efikon ĉe la partoprenantoj, kiel ĉiam, preter la simpligoj gurdaj de la burĝaj amasmedioj. Okazis multaj debatoj en okupitaj universitatoj, en kiuj nemalofte estis invitataj laboristoj aŭ emeritoj.

Negativaj punktoj:

- Bedaŭrinde plu temis pri defenda, kaj ne ataka movado: en Francio kiel preskaŭ ĉie en la mondo, la laboristoj ne batalas por akiri novajn rajtojn, sed klopodas ne ĉion perdi.
- Ne okazis ĝisfunda radikaligo de la movado. Aŭdiĝis ja kritikoj kontraŭ kapitalismo kaj alvokoj al ĝenerala striko, sed tion ni ne atingis.
- Kaj, ĉefe kaj plej zorgige, mankas politika perspektivo.

Kiajn sekvojn ni rajtas esperi?

Post tiu plua amasa mobiliziĝo, kiu sekvas tiun de 2005 kontraŭ la eŭropa konstitucio, montriĝas, ke signifa kvanto da maldekstruloj kapablas surstrate unuiĝi por kontraŭbatali la kapitalisman sociordon. Problemo estas, ke tiu unueco tute ne troviĝas en la politika pejzaĝo. Kvankam esprimiĝis ideoj pri unueca kontraŭkapitalisma kandidato al la venontjaraj prezidentaj balotoj, kiu povus esti Ĵoze Bove (ĝis nun ligita al neniu partio, kaj ĝuanta relativan famon en la amasmedioj), jam oficiale anonciĝis la kandidatiĝoj de du trockiismaj kandidatoj, kaj la FKP, kiu vokas al unueco, samtempe ne montriĝas preta rifuzi alianciĝon kun la social-liberaluloj, kio kompreneble ne igas ĝin kredinde radikala. Aliflanke la social-liberaluloj ĉantaĝas, ke la kontraŭkapitalistoj ilin bezonas por efike fronti la ekstreme reakcian ĉefkandidaton de la dekstro. Kompreneble la sinteno de la partiaj gvidantoj dependas ĉefe de la premo de la bazaj aktivuloj, kaj flanko de la maldekstro ĝi ne aspektas tre forta nuntempe. La komitatoj por unueca kontraŭkapitalisma kandidato, iniciatitaj de la FKP, ĝis nun montriĝas ekstreme diskretaj. Alia problemo estas, ke la movado restis pure franca, dum la detruo de la laborleĝoj estas mondskala fenomeno. En Beogrado pluraj kamaradoj intervenis por konfirmi, ke la laboristaro spertas similajn problemojn en aliaj landoj, ofte kun malpli viglaj kaj ampleksaj protestmovadoj. Kaj pri eventuala unuiĝo de la kontraŭkapitalistoj, la lastatempaj spertoj en Germanio aŭ Italio ne lasas nin esperi pri mirakloj... Tio kompreneble ne signifas, ke ni rezignacie ĉesu batali. Tute male!

Sekvas debato.

K-do **Mickle** diras ke ankaŭ en Germanio oni malkonstruas socialajn rajtojn. Lastatempe estis multo farita por malbonigi la situacion de la senlaboruloj. Redukto de la monkompensoj kiun ili ricevas. En la lastaj tri jaroj estis pluraj manifestacioj kontraŭ malboniĝo de sociaj rajtoj, tamen ne komparebla kun la francaj manifestacioj. En Berlino estis provo okazigi t.n. lundajn manifestaciojn. Li mem estis en unu el la komencaj. Fakte oni esperis multon de tiuj manifestacioj sed montriĝis ke tiuj planoj estis tro optimismaj. Fine tio ne daŭris longe. K-do **Montagner** informas ke en Italio oni kapablis alianci inter la komunistoj kaj katolikoj en politiko. Kelkaj katolikoj estas pli progresemaj ol kelkaj komunistoj. Fine la maldekstra alianco venkis kaj laŭ li, Italio povus esti modelo por aliaj landoj. Li demandas ĉu en Francio ne estas homo kiu kapablas kunligi progresemajn fortojn. K-do **Rooke** opinias ke ĉio dependas de la franca popolo, kiun ĝi elektos, ĉu maldekstron aŭ dekstron. Ĉu demokratio estas vere la plej bona modelo kaj ĉu

vere necesas politikaj partioj? Lia demando estas ĉu la maldekstro gajnos per la elektoj ? K-do **Enderby** diras ke pri la senlaboreco la sama situacio estas ĉie en la mondo. En Aŭstralio la argumentoj de la registaro kaj de la laborpartio similas, ke por doni laboron al ĉiuj necesas maltaltigi la salajrojn. Laŭ mia kono la sola okcidenta lando en kiu tio estas iom malsama estas Novzelando. Lastatempe en la Sud-Ameriko la maldekstraj partioj havas iom da sukceso, sed ĉu ĝi daŭros, neniuj scias. K-dino **Viola Murasaki** diras ke en Japanio la tendenco de laborista situacio estas tute sama. La malbona afero estas ke oni ne tre atentis pri tio, ĉefe ne junuloj. Ili kontentas pri sia privata vivo kvankam ilia estonto estas malsekura. Oni malmulte manifestacias. Do grava problemo en Japanio estas kiamaniere ŝanĝi tian sintenon. K-do **Prent** parolas pri la situacio en Britio. Tie ne okazas tiaspecaj aŭ tiatemaj manifestacioj. Ekzistas aliaj manifestacioj kiuj estas ekstertemaj, pri rasismo ktp. Kiam antaŭ dek jaroj estis t.n. dekstra registaro, ili tre malfortigis la sindikatojn. Unue ili limigis la strikojn postulante ke antaŭ la strikoj oni havu referendumojn pri tio (sekretajn voĉdonojn). Due oni ne plu rajtas havi ligitan strikon, t.e. ke rajtas striki laboristoj de iu entrepreno sed ne laboristoj de alia kiu kunlaboras kun ili. La laborpartio promesis ŝanĝi tiujn leĝojn sed kiam ili estis elektitaj, ili absolute nenion faris por tion ŝanĝi. K-dino **Toubale** konstatas ke ĝis nun oni aŭdis informojn kaj demandas ĉu iu povus antaŭvidi aŭ imagi iujn solidarecajn agojn? K-do **Schram** opinias ke la plej granda problemo de laboristaro aŭ maldekstro estas ke ĉiu konsideras sin la plej maldekstra sed la unuigo neniam eblas, eĉ ne en malgranda lando kiel Belgio. Eĉ malfacilas en malgranda asocio kiel SAT. Ĉiam estas tiaj homoj kiuj diras: Mi estas pli maldekstra ol vi.” Kiamaniere ni povas atingi ion se ne ĉiuj pensas ke nur ni pravas. Mi iom provis diskuti pri tio kio okazis en Francio kaj tuj kelkaj maldekstruloj komencis plendi pri detruoj de aŭtoj, ktp. Evidente, tio ne estas bona, sed tio estas parto de la ludo. Kiam oni parolas pri tio, oni ne parolas pri veraj problemoj, kaj kio estas la vera kaŭzo de tiaj aferoj. Oni daŭre starigas al si demandon: kial? Kial oni ne kapablas esti solidaraj? Ni nur konkurencas kun homoj el Hindio, Azio, ktp. Pri tio oni ne parolas en sindikatoj, ĉar sindikatoj nur protektas la propran regionon. Ili ne defendas laboristojn sed nur membrojn. Laŭ mi la laboristoj ne kapablas unuigi sen ke iu montru flagon kiun oni nepre devas sekvi. La afero estas simpla. Ni devas agadi kontraŭ tiuj kiuj ekspluatadas nin kaj ni ne kapablas tion. Ĉiu havas alian opinion en kiu grado li estas ekspluatata. Ĉiu havas sian propran opinion pri maldekstro, pri klasbatalo, ktp. Tio ege

malfortigas nin. Krome oni devas demandi sin, kiu elektis tiujn aĉajn registarojn? Kial oni havas iun Bush aŭ Blaire? Kiam ni havos la respondon, eble ni havos alian mondon.

Oni transiras al dua temo. Enkondukas ĝin k-dino **Viola Murasaki**:

NACIISMO KAJ NIA PROPRA EDUKADO

----- Unu el celoj de edukado en publikaj lernejoj en ĉiuj regionoj, estas krei el infanoj bonajn civitanojn. Difino de bona civitano estas decidata de registaro, kiu preparas edukadan sistemon.

Kreski identecon kiel membro de iu grupo, samdirekte kun registaro estas nature inkluzivita en iliaj programoj.

Infanoj tre ofte ricevas mesaĝojn naciismajn aŭ kaj ŝtatanismajn, ĉiakaze ne sennaciismajn.

Nun kiel reago de tutmondiĝo, registaro fortigas naciisman tendencon al siaj membroj. Ĉi tie mi prezentas raporton faritan de nia japana K-do Tetu Makino pri nuna okazantaĵo en Japanio.

AFERO PRI LA FUNDAMENTA LEĜO DE EDUKO EN JAPANIO

La Fundamenta Leĝo de Eduko de Japanio estis establita en 1947, intime ligite al la spirito de la pacista Konstitucio de Japanio. Ĝi estis liberiĝo el eduko por kreo de nacioj kiuj dediĉas sian vivon al la militista ŝtato—la Granda Japana Imperio, kiu malvenkis en la Azia-Pacifika milito. Pasis 60 jaroj kaj ĝis nun la leĝo estis bazo por instruistoj kiuj celas edukon por paco kaj demokratio. Sed nun dekstruloj kaj ilia registaro projektas malbonigon de la leĝo.

Estis longa debato inter tiuj kiuj insistas ke al la leĝo mankas eduko por patriotismo kaj tradiciaj aŭ naciismaj valoroj kaj ke la leĝo devas esti reviziita, kaj tiuj kiuj insistas ke tia malbonigo de la leĝo renversos la frukton de progreso de historio kaj renaskos la naciisman servecon al la ŝtato.

La registaro decidis la planon de malbonigo de la leĝo la 28an de aprilo 2006. La plano de la registaro nuligas la parton “la realigo de la ideo (de la Konstitucio) dependas fundamente sur la povo de eduko”, kaj nove aldonas “la spiriton de publikeco”, kaj “la heredadon de la tradicio”. Kiel unu el la celoj de eduko, la registaro emfazas la moralon de “kresko de la sinteno de amo al nia ŝtato kaj hejmlando”. La registaro ne

povis atingi sian celon dum la periodo de ĉi jara sesio dumprintempa, sed fortigas la propagandon pri nova leĝo dum ĉi-tiu somero, kaj havas firman decidon ke la malbonigo estu realigita en la eksterordinara sesio en la venonta septembro.

La esenca celo de la nova Fundamenta Leĝo de Eduko estas fortigo de rego de la registaro al eduko por mobilizi landanojn al ŝtata profito.

Instruistoj estas truditaj al riverenco al la nacia flago “Hi-no-maru” kaj kanto de la nacia himno, malgraŭ ke ili estis simboloj de la agreso de la Japana Imperio al Azio.

Sociaj problemoj ĉirkaŭ infanoj ne povas solviĝi per enkonduko de administro de “koro” de la regantoj.

Ĉu ni ne devas progresigi liberan edukadon por florigo de individua personeco kiu amas pacon, justecon kaj veron sendependan de la malvasta profito de la registaro? Severa batalo inter la registaro kaj progresema popolo okazos en la venonta septembro en Japanio.

Raportis Tetu Makino, por la laborkunsido de SAT kongreso en Beogrado.

Ĉi tio estas situacio de lernantoj en Japanio. Do, nun alia demando. Ĉu ĝi estas afero de unuopaj homoj? Ne.

Kiu faras edukadon por plenaĝuloj? Ĉefe amaskomunikiloj. Ili donas informon kaj modelon de pensmaniero al homoj. Plej multaj de elsenditaj informoj ne staras sur sennacieca bazo. Kiam elsendantoj elektas novaĵojn por konsciigi al homoj, kio estas okazanta en la mondo, ekzistas jam propra naciocentrisma filtrilo.

Mondskale, sportaj okazaĵoj estas tre efike uzataj politike por agiti teaman spiriton, reciproke havante hipotezan malamikon. Unuopaj homoj ĝuas etoson de entuziasmo, sed amaskomunikiloj preskaŭ ĉiam esprimiĝas pri tio kvazaŭ ĝi estas tutlandana fenomeno.

Nu, ĉi tie ni ne venas por simple kondamni aŭ bedaŭri tiujn okazantajn fenomenojn. Mi invitas vin pripensi; kiel ni realigas sennaciisman kaj kosmopoliteman vivon nun nia vivo, forpuŝante alvenantan naciisman etoson.

Ni interŝanĝu informojn, kion vi aŭ viaj idoj aŭ amikoj spertis en vivo, kaj kiamaniere vi reagis. Prezentu kiel vi kreskis vian sintenon por pli vasta solidaremo ne nur ene de via lando.

Nuntempe la mondo estas dismetita en ĉiuj

landoj, kaj en ĝi dekomence naciŝtatisma tendenco estas preparata en ĝia karaktero. Do, ni mem devas aktivi por krei situacion kiun ni volas.

Ni invitas vin interveni, ne tro pri plendoj pri nuna situacio sed multe pli pri kion vi faris kaj pri viaj proponoj.

Oni transiras al diskuto.

K-do **Rooke** informas ke en Svislando kaj certe en aliaj landoj oni lernas pri la historio de la lando kaj popolo. La instruistoj devas sekvi lernoprogramon kiun la registaro trudas kaj en tio tute ne estas liberaj.

K-dino **Toubale** memorigas ke la demandoj de Viola estas ĉefe pri personaj spertoj kaj ne ĝenerale.

K-do **Montagner** memoras pri la maniero kiel li estis edukita, pri Italio kiu estas bone farita kiel unu nacio. Sed kun la jaroj li konstatis ke Garibaldi povus esti briganto kaj ke la Suda imperio estis granda kaj forta ekonomio kaj nun estas problemo. Mi konstatis ke la forta ekonomio de la Norda Italio estas bazita sur la laboristoj kiuj venas el la Suda Italio.

K-dino **Toubale** petas permeson por mem interveni. Antaŭ ol veni al Beogrado ŝi havis ŝancon renkonti SAT-anojn en Suda Koreio. Ili diskutis pro sociaj problemoj, problemoj de enmigrintoj, ktp. Parolante ĉiuj diris, “en nia lando, en nia lando”. Fine iu kamarado demandis kiel la homoj kiuj nomas sin sennaciistoj povas daŭre diri en nia lando. Oni diru en Koreio, en Aŭstralio kaj ne en nia lando. Estis per tiuj malgrandaj detaloj ke oni povas konstati kiagrade oni estas senkonscie naciisme influata.

K-do **Mickle** substrekas ke tio kion Franciska diris estas tre grava. En eŭropaj landoj tiuj naciismoj estas tre fortaj kaj ĉiuj sentas sin apartenaĵo de iu nacio aŭ ŝtato. K-do **Enderby** opinias ke sennaciismo estas valora koncepto kaj li konsideras sin sennaciulo pli ol aŭstraliano. Sed kiel politikisto li volas memorigi ke la koncepto de ekspluatado estas ne nur uzata de kapitalistoj. Oni eksplutas homojn pri sento de identeco. Ja politikistoj tion faras. En la norda parto de Aŭstralio kie loĝas indiĝenaj popoloj (ili havas nigran haŭton) la ĉefo de tiu popolo havas komplete blankan haŭton kaj ruĝajn harojn. Do rase, li certe ne estas aborigeno. Li parolas la anglan pli bone ol mi mem. Li uzas la senton de aborigenaj popoloj por gajni bonan postenon en la registaro. Fakte nur per konstanta edukado oni povus solvi tiun problemon.

K-do **Kessous** diras ke lin ne ĝenas se iu parolas pri nia lando. Estas pli bedaŭrinde aŭdi kiam iuj diras, ni la francoj, ni la japanoj, kvazaŭ tiuj francoj, japanoj, belgoj estus funde diferencaj. Oni ja bone scias ke kiel oni diras, “kiom da kapoj tiom da pensoj”. Francio tute ne estas homogena lando ĉar tie vivas multaj

diversaj homoj.

K-do **Prent** diras ke en Britio eduka sistemo grave ŝanĝiĝis depost kiam li estis formale edukita. Oni apenaŭ rekonas ĝin. Nun ĝi estas tiel rigora kiel en Francio aŭ Germanio, kun temoj kiujn oni devas trakti. Nun dum la lernejoj estas tiom da striktaj kontroloj kaj ekzamenoj. La instruistoj tute ne estas liberaj en la instruado kaj devas tro okupiĝi pri administraj aferoj. Li ne scias ĉu oni precize instruas pri naciismo, sed tio eĉ ne necesas. Ja por la granda parto de britoj unu el ĉefaj partoj de la vivo estas la futbalo kiu kunportas la naciismon. Dum la monda futbalkonkuro la duono de aŭtomobiloj en Anglio portis anglajn flagojn (ne la britan).

K-do **Markov** spertis iom alian sperton en propra edukado. Li estis en lernejo kiam oni konstruis Eŭropan Union kaj la naciismo en lernejo estis ĝuste tiu eŭropa naciismo. La antaŭaj generacioj opinias ke tio estas bona afero kiu sukcesis normaligi rilatojn inter Francio kaj Germanio, sed montriĝas ke nun kreiĝas unu nova granda ŝtato. La naciismon oni konstatas ĉe la landlimoj. Interne oni ne havas limojn sed ekstere oni konstruas muregon por malebligi al la homoj el ekstereŭropaj landoj facile veni. Tiu naciismo ankaŭ estas tre utila por trudi homogenigon de malsupre de socialaj leĝoj en Eŭropo.

K-dino **Banet-Fornalowa** diras ke en Pollando estas tre malfacila situacio ĉar tie estas dekstra registaro kun granda forto de eklezio. Eklezio regas ĉion. Do oni devas labori kun infanoj hejme kaj instrui al ili ke ni ĉiuj estas unue homoj.

Per tio finiĝis la dua temo.

Ĉar restas kelkaj minutoj antaŭ paŭzo, k-do **Westermayer** donas kelkajn informojn pri nia k-do Sekvojo. Grupo en Frajburgo havas kontakton kun Sekvojo. Estas tri diversaj aferoj. Unu estas simpla persona kontakto, skribi leterojn kaj akcepti ke li voku nin (ni pagas la telefonkoston). Antaŭ unu monato li parolis kun Sekvojo. La dua afero kiun oni faros en Freiburg estas sendi al li ĉiun kvaronjaron pakaĵeton kun aferoj kiujn li tre deziras. Tio kostas ĉirkaŭ 80 € ĉiun kvaronjaron. Lia koleginino en Frajburgo, Ivon tre multe laboris pri la ĉefa libro de Sekvojo kiu rilatas al lia vivo kaj iom kontraŭ la teorio de Einstein. Li mem ne tre subtenas tiun parton pri Einstein sed nepre subtenas la eldono pri lia vivo. Rilate al la mortpuno, la grupo en Svislando ĉion faras por ke li havu novan proceson pli justan, ĉar la unua proceso estis tute maljusta. Tiam li ne volis havi ŝtatan advokaton sed li mem defendis sin kaj sen sukceso. Oni postulas ke oni faru la analizon de DNA por vidi ĉu estas vere li kiu faris tiujn krimojn (20 krimoj en ses monatoj). Li

renkontis lin en Aŭgsburg en somero de la sama jaro kaj ne povas kredi ke li faris tiujn krimojn.

K-do **Enderby** revenas al la diskutita temo pri la eŭropa identeco. Laŭ la “Hilelismo” de Zamenhof, li demandas sin kio estas popolo (ne nacio) kaj konstatas ke la popolon determinas lingvo. Do li sin demandas kiel povas ekzisti eŭropa naciismo ĉar en Eŭropo estas tiom da diversaj lingvoj.

K-do **Markov** respondas al k-do Enderby ke nun kiam estas problemoj en iuj ŝtatoj oni kulpigas Eŭropon pri tiuj problemoj. Krome ekzistas eŭropa flago, eŭropa himno kiun foje oni eĉ trudas en iuj kongresoj kaj ankaŭ ekzistas eŭropa ŝovinismo, kiu manifestiĝas per sufiĉe primitiva argumentado kontraŭ Usono. Pri la konstitucio, la ideo estis ke ni estu ĉiuj fortaj kaj tiel ni povos kontraŭstari al Usono, ĉar Usono estas nur barbaroj kaj Eŭropo estas portanto de grandaj humanismaj valoroj kiuj nur en Eŭropo ekzistas. Tio ĉio estas elementoj kiuj kontribuas al la kreo de la nova eŭropa naciismo.

K-do **Rooke** nur indikas ke prof. Tonkin verkis libron “Lingvo kaj popolo” kaj ĝi havas intereson por ni por scii ĉu ni havas identecon de popolo.

K-do **Morankiĉ** opinias ke por krei la eŭropan identecon oni nepre devas uzi iun neŭtralan lingvon, ĉu latinan, ĉu Esperanton.

K-do **Djuriĉ** same opinias sed ĝi povas esti nur Esperanto, komuna lingvo por Eŭropo kaj ĉiu parolu hejme sian propran lingvon.

K-do **Westermayer** opinias ke Esperanto estas tutmonda lingvo kaj ne povas esti eŭropa identigilo, kvankam oni povas uzi ĝin.

K-do **Morankiĉ** akceptas ke Esperanto estas tutmonda lingvo sed la nuna eŭropa elito kreas eŭropan identecon per la angla lingvo, kaj la popoloj devus fari ĝin per Esperanto.

Paŭzo.

Tria temo : Enkondukas k-do Gary **Mickle** :

Ĉu SAT informu pri Esperanto samstile kiel la “neŭtrala” medio?

Kamaradoj, kiuj kutimiĝis strikte distingi inter “poresperantaj” kaj “peresperantaj” agadoj, ŝajnas ofte kredi, ke la unuaj havas malmulte politikan karakteron. Indikas tion la relativa malofteco de disputoj en SAT pri la prezento de Esperanto al vasta publiko. Plia indiko estas la foje renkontata similito de la stilo kaj la enhavoj de UEA-informado. Lanti siatempe kritikis tiun sintenon. Pri la “t.n. neŭtralaj grupoj” kaj ilia stilo de Esperanto-informado li diris: “Tie ĉiu esperantisto, ĉu revoluciulo, ĉu

'bona patrioto', pagas kotizon. Ĉu por propagandi senescepte en ĉiuj medioj? Tute ne. La propagandiloj estas tiele verkataj, ke ili estas varbpovaj nur en konservativaj rondoj. Sekve la propagando en revoluciaj medioj malsanas, dum ĝi sufiĉe bonfartas alie." Ĉu la cirkonstancoj ŝanĝiĝis fundamente post la epoko de Lanti? Ni rigardu. Necesas fari tion, ĉar ankaŭ la principe "peresperanta" SAT diversokaze prezentas sin al neesperantista progresema publiko. Ĝi ne kapablas, eĉ se ĝi volus, eviti la demandon pri sia malortodoksa elekto de la laborlingvo Esperanto.

Disigi "peresperantan" agadon de "poresperanta" en la praktiko ne bone eblas. La praktika aplikado de Esperanto estas la plej efika poresperanta reklamo. Vikipedio kaj entute la grandskala uzado de Esperanto en interreto envitrinigas Esperanton por larĝa publiko, kiu alie neniam renkontus ĝin. Aliflanke, la poresperanta agado – informado pri Esperanto – estas la plej rafinita ĝeneralpolitika agado, kiun esperantistoj faras. Ĉiu varbocela Esperanto-informado estas vehiklo de ĝeneralaj politikaj ideoj – ne nur lingvopolitikaj. Informadon pri Esperanto kutime akompanas pledoj por aferoj kiel kultura diversismo, lingvopurismo, internaciismo, pacismo, sennaciismo kaj mi ne scias kio alia. Neeviteble, ĉar lingvopolitiko ne ekzistas en ideologia vakuo.

Klaras, ke SAT devas okupiĝi pri la politikaj implicaĵoj de siaj eldiroj pri Esperanto. Ne apriore klaras la respondo je kelkaj specifaj demandoj, kiuj sin trudas:

- ♣ Ĉu nia ekstera informado ĉefe prezentu Esperanton, ĉu SAT?
- ♣ Ĉu ni pli emfazas la potencialon de Esperanto kiel monda lingvo, ĉu pli la realon de la nuna Esperanto?
- ♣ Ĉu ni eble alparolu homojn per la persona utilo, kiun ili povas ĉerpi el Esperanto?
- ♣ Ĉu konvenas informi pri Esperanto tute sen referenco al la tradicie komprenata "fina venko"?
- ♣ Ĉu la monda lingva situacio evoluas tiel, ke Esperanto baldaŭ ne plu havos venkoŝancon, kaj se jes, kiel SAT rilatu al tio?
- ♣ Ĉu SAT povas fanfaroni pri rilatoj de esperantistoj al politikistoj kaj parlamentanoj?
- ♣ Ĉu SAT havu opinion pri la agado de "Esperanto-partio" (EDE)?
- ♣ Ĉu utilas informi pri la tradicie komprenata "celo de Esperanto" sen priparoli la politikan opiniklimaton, en kiu la lingvo havus ŝancon "finvenki"?

♣ Kia estus tiu opiniklimato (se ni supozas ĝian ekziston): revolucia, antaŭrevolucia, maldekstre klinita, aŭ tendencanta al etnismo, naciismo, identismo k.s.?

♣ Kiugrade Esperanto-informado provu havi ĝeneralklerigan valoron koncerne lingvistikajn, socilingvistikajn, politikajn temojn?

♣ Ĉu pli elstarigi geopolitikajn ("anglosaksoj kontraŭ ne-anglosaksoj"), etnopolitikajn ("konservo de etnaj identecoj"), kulturpolitikajn ("kultura diverseco"), lingvopolitikajn ("preventi degeneriĝon de lingvoj", "preventi lingvo-ĉernobilon"), pacpolitikajn ("lingvo de paco") aŭ klaspolitikajn ("egaleca aliro al internacia komunikado", "kunluti la mondan proletaron") argumentojn?

♣ Ĉu SAT simple lasu la Esperanto-informadon al UEA kaj ĝiaj landaj asocioj?

♣ Ĉu SAT kunlaboru kun UEA kaj ĝiaj landaj asocioj en la informado, kaj se jes, kiel?

Je multaj el la supraj demandoj estas certe ne nur unu "sole ĝusta" respondo. Preskribi unuecan linion pri la Esperanto-informado ne pli konvenas al SAT ol ĝi konvenus pri aliaj politikaj demandoj. La SAT-statuto difinas la celon "helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn...". Ĉu tio validu nur por la rilatoj inter la SAT-anoj, aŭ ĉu ne ankaŭ por la rilatoj de SAT al la ekstera mondo? Se tiel estas, eblas dedukti almenaŭ ĉi tiujn du gvidprincipojn, kiuj laŭeble donu direkton al ĉiu SAT-specifa Esperanto-informado:

♣ SAT-informado estu skrupule honesta. "Informante" per blufoj kaj mensogoj, ni montras malrespekton al homoj, kiujn ni taksas niaj kamaradoj.

♣ SAT-informado estu lingvopolitike kleriga. SAT perlaboru estimon de maldekstruloj per la politika-kleriga funkcio, kiun ĝi havu ne nur ĉe membroj, sed ankaŭ ĉe nemembroj.

Debato:

K-do **Prent** parolas pri la diferencoj inter niaj informiloj kaj tiuj de neŭtraluloj. Li, opinias ke nia unua flanko estas trakti la celojn de SAT. Tio estas la grava afero. Kial ekzistas SAT? Por atingi kaj realigi niajn celojn SAT uzas Esperanton kaj pro tio due oni parolu pri Esperanto. Evidente ke kiam oni komunikas kun esperantistoj la dua parto ne necesas. En la diskuto kun neŭtraluloj pri informilo, la demando estis, kiucele ni proponu al homoj lerni Esperanton? En tiuj informiloj oni tuj parolas pri Esperanto sed preskaŭ

neniam pri kialo lerni ĝin. SAT havas tiun privilegion ke ĝi povas proponi al diversaj politikaj grupoj uzi Esperanton por rilatoj kun samtemaj grupoj en aliaj landoj. Pri la defendo de minoritataj lingvoj, tio ne estas nia celo.

K-do **Schram** diras ke por li la afero estas simpla. Li fajfas pri lingvoj. Pardonu ke mi malbone esprimas min sed mi estas simpla laboristo kun baza eduko kaj pro tio havas alian esprimmanieron ol homoj kiuj pli longe studis. Mi elektis SAT pro ĝia Statuto. SAT hazarde elektis Esperanton kiel laborlingvon. Evidente dum la preskaŭ naŭdekjara ekzisto de SAT estis multaj ŝanĝoj en nia strukturo kaj en la mondo. Oni devis fari kelkajn kompromisojn kaj unu bona estas la kreo de tiu Poresperanta fako. Espereble ĝi propagandas Esperanton laŭ la idearo kaj Statuto de SAT. Ne estas nia problemo ĉu Esperanto estu eŭropa lingvo aŭ protektanto de naciaj lingvoj. Ni devas proponi Esperanton kiel lingvon kiu vere utilas al laboristoj kaj nenion pli. Ĝi estas nur lingvo, ilo, kiu permesas paroli kun homoj el diversaj partoj de la mondo.

K-do **Montagner** diras ke ili havis en Italio budon en la festo de Asocio kiu zorgas pri la protektado de la medio. Do estis Itala E-Federacio kaj ARCI-Esperanto kiuj havis budojn. La kunlaboro estis bona kaj li pensas ke oni povas kunlabori kun neŭtraluloj kaj propagandi pri la celoj de SAT.

K-do **Enderby** diras ke Arturo aludis pri la fina venko. Ĝi estas utila koncepto sed baze malĝusta. Ne povas esti fina venko same kiel ne povas esti fina venko kontraŭ terorismo aŭ krimo. Neniu socio, reĝimo havis finan venkon.

K-do **Kelso** multe pripensas kaj entuziasmas pri la koncepto de sennaciismo. Fakte SAT pravas kaj neŭtrala movado malpravas. Kial? Tute simple ĉar Esperanto ne estas neŭtrala lingvo. Ĝi estas neŭtrala en la senco ke ĝi ne estas imperia lingvo. Ĝi ne estas hegemonia lingvo. Ĝi ne apartenas al iu potenco aŭ partio. Sed ĝi ne estas neŭtrala rilate al sociaj, politikaj kaj ideologiaj valoroj. Se sciencisto vizitus E-kongreson ĉu li renkontus hazardan elekton de la homaro. Ne! Ekzistas iuj faŝistoj kaj naciistoj inter esperantistoj sed ne tiom. La granda plimulto de esperantistoj estas progresema, ili favoras socian justecon, homajn rajtojn, ktp. Ĝenerale Esperantomovado estas modere maldekstrema kaj progresema movado. Iu ajn povas vidi tion. UEA ne volas agnoski tiun fakton ĉar ili timas dividi la movadon. Laŭ mi ili eraras. Sed se ili preferas tiel fari ni lasu ilin. SAT elektas ne fari tiel. Ĝi preferas ne nur uzi la lingvon sed ankaŭ la principojn de internaciismo aŭ se vi preferas de transnaciismo. Do kiam ni propagandas

Esperanton ni samtempe propagandu niajn ideojn kiuj iras kun la lingvo, t.e. homa frateco, socia justeco, egaleco inter lingvaj grupoj, homaj rajtoj ktp.

K-do **Kessous** revenas al la diro de k-do Enderby ke Bush volas finan venkon kontraŭ terorismo. Li ne kredas tion, ĉar estas certe ke Bush bezonas terorismon por daŭrigi siajn fiaĵojn. En la historio tamen estis kelkaj finaj venkoj aŭ preskaŭ finaj venkoj. Ekzemple la arabaj ciferoj (fakte ili venas el Hindio). Nuntempe ĉie en la mondo oni uzas la arabajn ciferojn kiuj estas pli bonaj ol antaŭaj latinaj. Do arabaj ciferoj kvazaŭ finvenkis. Laŭ li SAT estas iamaniere finvenkista ĉar ĝi celas ne nur venkon de Esperanto sed ankaŭ de iu socialisma socio. Socialismo estas vole-nevole transnaciisma kaj ĝi bezonas iun universalan lingvon.

K-do **Montagner** konstatas ke SAT estas la sola organizo en la mondo kie laboristoj estas unuigitaj kaj ne dividitaj. Konvinki homojn ke Esperanto estas progresema ne utilas.

K-dino **Banet-Fornalowa** daŭre insistas ke nia organizo estu kleriga. Ivo Lapenna multe riproĉis la neŭtralismon de UEA ĉefe dum la faŝisma epoko kaj li fondis koncepton de humanisma neŭtralismo. Ĉiam kiam estas maljusto, ni ne povas esti neŭtralaj. Marks mem diris ke neniam oni povus diri pri iu sistemo ke ĝi estas la fina, la fina venko. Fina venko estas iu dogmismo kaj ni evitu ĉiujn dogmojn. Dum la tridekaj jaroj kiam estis granda moviĝo de laboristoj pro senlaboreco, SAT-anoj multe helpis. Ni studu historion kaj kleriĝu kaj tio multe povos helpi al nia agado.

K-dino **Viola Murasaki** atentigas ke la temo estas pri propagando de Esperanto por niaj propraj celoj. La nunaj junaj homoj ne havas grandan intereson pri teorio de Esperanto. Kiam mi aliĝis al loka grupo, la gvidanto de la grupo daŭre parolis pri la kreinto de Esperanto, sed tio estas tre enuiga temo. Mi volis havi informojn kiamaniere mi povus uzi kaj utiligi konkrete tiun lingvon. Nun miaj amikoj neesperantistaj demandas min kial mi denove vojaĝas al Eŭropo. Mi klarigas al ili pri miaj kontaktoj kaj ke mia esperantista amiko helpas al mi por tiu vojaĝo. Mi ŝatus aŭdi kion vi, ni ĉiuj, konkrete faras per Esperanto.

Sekvas la lasta temo : Enkondukas **Djemil Kessous**

Enkonduko al la diskuto pri la milito en Libano

Mi enkondukas tiun diskutemon resumante freŝdatan artikolon skribitan de Thierry Meyssan ĉe la

“Réseau voltaire” (reto Voltero, perreta kaj plurlingva servo de alternativaj informoj vd., en la franca, www.voltairenet.org/fr)

Laŭ Meyssan, la malvenko de Israelo fronte al populara gerilo estas nevidita evento depost la bombadoj de Hanojo kaj la venko de la vjetnama popolo kontraŭ la usonaj trupoj. La atakplano estis delonge pretigita alianco per la israelaj kaj usonaj staboj. La strategio elektita estis tiu de “Ŝoko kaj Teroro” (*Shock and Awe*) necesa por elmontri la “aerpotencon” (*Air Power*). Tiu teorio celas pruvi ke, sen grunda batalo, amasa bombado povas sufiĉi por formeti la malamikon en malviglecan staton, trudante al ĝi la kapitulacion.

Post unu tago kaj duono, la israela armeo estis ruiniginta la vojaron kaj la komunikilojn de la tuta lando. Nur restis vojoj ligantaj la Nordon de Libano kun Sirio, sur kiuj enviciĝis amasoj da rifuĝintoj. La bombadoj translokis unu milionon da personoj. Ekde la dua tago la aviadiloj bombadis la televidstacion *Al-Manar* kaj la naciajn sidejon de la Hizbolaho, en popola kvartalo de Bejruto. Ĉar tiu atako interrompis la programon de *Al-Manar* nur du minutojn kaj okazigis nenian damaĝon al la organizado de la Hizbolaho, la israela stabo kredis ke la estroj de la televido kaj de la partio estis rifuĝintaj en bunkroj sub la ruboj. Ili daŭrigis dum ses tagoj la bombadojn por findetui la supozitajn subterajn ejojn antaŭ ol konscii, ke tiu ĉi ekzistas nur en ilia imago.

Meyssan asertas ke la israelaj bombadoj havas nenian komunan mezuron kun la rebato de la Hizbolaho. Ili uzis aviadilojn F-15 por ŝuti tapiŝon da bomboj kaj pulvorigi ĉiujn urbojn en suda Libano. « Neniam, laŭ li, nacio aŭdacis uzi tian specon de bombado en urba zono depost la detruo de Hanojo en 1972 de la “US Air Force” (usona aerarmeo), neniam, ekde tiam, moderna armeo spertis tian malvenkon fronte al gerilo ». Male, “la Hizbolaho uzis misilojn, kiuj celis nur armeaĵojn, eĉ se la alĝustigo de la artilerio necese atingis civilaĵojn. Estas pruvite ke la libana rezistado detruis militan flughavenon, la ĉefan centron de elektronikaj transsendoj, la ĝeneralan stabon de la norda israela armeo kaj grave damaĝis du armeajn ŝipojn”.

Ne nur la aera, sed pli grave, la terena ofensivo fiaskis. Ekde la unua tago, la provo de penetrado per tankoj malsukcesis kaj la trupoj devis retroiri. La aŭtoro raportas, ke la Hizbolaho estas reto de rezistantoj, kiu formiĝis dum la israela okupacio (1982-2000). Ĝi konsistigis imponan armilaron helpe de siaj aliancanoj Sirianoj, Irananoj, eble Rusoj. Ĝi asimilis la gerilteknikojn kaj ilin ĝisdatigis, inventante formon de gerilo kiu utiligas tute heterogenan ilaron.

Tiel, ĝi enfosis telefonojn de kampanjo interligitaj per klasikaj dratoj, kies interkapto ne eblas kompare kun la bitigitaj komunikoj, samtempe uzante modernegajn infraruĝajn binoklojn por kreskigi la moveblecon de siaj sturmtrupetoj.

Meyssan starigas la sekvan demandon : « oni devas sin demandi ĉu la Libanmilito ne estos la historia signo de la forpaso de la tanko, samkiel la batalo de Azincourt (en 1415 dum la Centjara milito inter Francio kaj Anglio, signas la malaperon de la kirasa kavaliro) ». Tiuteme, li observas ke « la israela ministro pri la defendo ĵus anoncis, ke li ĉesis la produkton de la tanko Merkava, ĝisnun konsiderata kiel unu el la plej bonaj el la tutmondo ».

Laŭ Meyssan la Hizbolaho estis helpita en Israelo de kontraŭcionistoj kiuj transsendis al la libana Rezistado gravan dokumentaron.

Post kiam li komparis Hassan Nasrallah kun Ho Ĉi Minh kaj Mandela la aŭtoro asertas ke la Hizbolaho fariĝis politika aktoro nevidebla en Israelo, kie ĝi simbolas « la finon de la apartismo kaj la starigon de daŭra paco senescepte por ĉiuj popoloj ».

Konklude la isreala ofensivo kadre de la strategia rearanĝplano de la landlimoj de la Granda Mez-Oriento aperas kiel ĝenerala fiasko.

Komentoj

Kvankam mi grandparte samopinias kun Meyssan, mi havas kelkajn kritikojn al liaj tezoj. Unue historia kaj « teknika ». La aŭtoro sugestas ke la Libanmilito estos (eble) « la historia signo de la forpaso de la tanko, samkiel la batalo de Azincourt (1415) signas la malaperon de la kirasa kavaliro ». Nu, la historio montras al ni ke okazis bataloj kun kirasaj kavaliroj longtempe post 1415, eĉ unu jarcenton poste dum la militoj en Italio, eĉ kelkaj trupoj de Napoleono surmetis parte kirasojn (por la brusto). Tiuteme estintus pli oportune kompari la militon de Libano al la fiasko de la « Armado » de Filipino la IIa (somero de 1588) kiam la « barbaraj » angloj tiam venkis la hispanan ŝiparon ĝis tiam taksatan nevenkebla.

Pli ĝenerale, kiam la aŭtoro asertas ke « la Hizbolaho utiligis misilojn, kiuj celis nur militaraĵojn », tio ŝajnas iom tendencema. Civiluloj mortis en Israelo pro tiu milito, eĉ araboj. Tamen la rilato inter civilaj kaj militistaj viktimoj estas inversa de tiu en Libano. Fakte, en tiu momento kiam ĉiuj traktas tiun movadon kiel integrisman aŭ terorisman, la sinteno de Meyssan notinde malsimiliĝas. Ni tamen, kiel progresemluloj, bone priatentu ne tro

tordi la bastonon aliflanke. La Hizbolaho estas religie fundamentisma movado iom malproksima al niaj idealoj. Ekzistas sentebla diferenco inter Ho Ĉi Minh kaj Nasrallah. Sed, kiel mi iam asertis, ni ne povas resti neŭtralaj, en ĉiu kontraŭimperiisma movado, naciisma aŭ religia.

Bedaŭrinde ne plu estis tempo por la debato. Per tio finiĝis la tria laborkunsido.

KVARA LABORKUNSIDO

Prezidas: K-dino Renata Chassard

Kiel ĉiam la kvara laborkunsido estas dediĉita al la pritrakto de la **Deklaracio** kaj la **Gvidrezolucio**. Post longa debato kaj diversaj proponoj la du dokumentoj estis fine adoptitaj (vidu Sennaciulon n° 8-9 (1214-15) 2006, paĝo115). Per tio finiĝis la kongresaj laboroj de la 79-a SAT-Kongreso en Beogrado.